Bibliothèque nationale de France
Département de la reproduction

## AVERTISSEMENT

Pour des raisons de conservation du document original, le recours à un microfilm a été privilégié pour réaliser cette reproduction. Le fichier qui vous est livré est donc en noir et blanc et non en couleurs.

En outre, si nous veillons à garantir la meilleure lisibilité possible, des défauts inhérents au microfilm peuvent subsister : défauts d'aspect et qualité des illustrations, notamment.


Nous vous remercions de votre compréhension.

## NOTICE

Due to the preservation state of the original document, the use of a microfilm was favored to make this reproduction. Therefore, the delivered document is in black and white and not in color.


We ensure the readability of the text but some defects inherent to the microfilm may remain : defects in the appearance and quality of the illustration in particular.

We thank you for your understanding.




Texte détérioré — reliure défectueuse

**NF Z 43-120-11**



Original illisible

**NF Z 43**-120-10




Contraste insuffisant

**NF Z 43**-120-14

186
8.10

BULTENO

DE

# LIBERA PENSO

Internacia Societo Esperantista de Liberpensuloj

JARO 1908-1909. — N° 6. Januaro

R. F.

## DEKLARO DE PRINCIPOJ

DE LA INTERNACIA KONGRESO DE LA LIBERA PENSO
EN ROMO 22 SEPTEMBRE 1904
PREZENTITA DE S-RO F. BUISSON, KAJ UNUVOĈE AKCEPTIKA

**I· — Unua rezolucio : difino de la Libera Penso Ĝenerale**

La Libera Penso ne estas doktrino; ĝi estas metodo, t. e. maniero konduki sian penson — kaj sekve sian agadon — sur ĉiuj kampoj de la individua kaj socia vivo.

Tiu metodo karakteriziĝas ne per aserto de iaj apartaj verajoj, sed per ĝenerala promeso serĉi la veron en kiu ajn vico nur per la naturaj rimedoj del homa spirito, per la solaj lumoj del racio kaj del sperto.

La Libera Penso povas esti konsiderata ĉu teorie, en la intelekta vico, ĉu praktike, en la socia vico. En la ambaŭ kazoj, ĝi determiniĝas laŭ la du jenaj reguloj.

**II. — Dua rezolucio : du reguloj de la Libera Penso en vico teoria aŭ intelekta**

1. La Libera Penso, ne povante alskribi al ia ajn aŭtoritato la rajton sin kontraŭmeti aŭ eĉ sin supermeti al la homa racio, postulas, ke siaj, anoj estu nome forjetintaj ne nur ĉiun kredon altruditan, sed ĉiun aŭtoritaton pretendantan altrudi kredojn — ĉu tiu aŭtoritato sin apogas sur rivelo, sur mirakloj, sur tradicioj, sur senerareco de iu homo aŭ de iu libro, ĉu ĝi ordonas sin klini sub dogmoj aŭ sub aprioriaj principoj de iu religio aŭ filozofio, sub decido de publikaj povoj aŭ baloto de plimulto, ĉu ĝi apelacias al iu ajn

Journ° 80223

formo de premo farita elekstere sur la individuon por deturni lin normale uzadi siajn kapablojn sub sia persona respondeco.

2. La Libera Penso, ne povante sin limigi je tiu negativa manifesto pri ĉiu dogmo kaj kredaro, postulas de siaj anoj ageman penadon por efektivigi per la homaj rimedoj la homan idealon.

Ĝi aliparte rifuzas doni al sia propra kompreno de tiu idealo la karakteron absolutan sensanĝan, kiun la religioj mal prave aljuĝas al si, sed kiun konsentas nek scienco nek konscienco de la homo, devigataj ambaŭ moviĝi en la relativo kaj submetitaj al la leĝo del progreso.

Kontraŭe ol cedi al la tento antaŭtempe konstrui definitivan sistemon, la Libera Penso proponas al la homaroj kiel volas la naturo del aferoj, senfine persekutadi la veron per la scienco, la bonon per la moralo, la belon per la arto. Kaj kiel je ĉiu momento de sia kreskado ĝi esta preta klarigi la nunan rezultaton de siaj serĉoj, tiel ĝi estas ĉiam preta tiun kompletigi kaj korekti, almetante al la hieraŭaj eltrovoj la hodiaŭajn eltrovojn.

### III. — Tria rezolucio : du reguloj de la Libera Penso en vico praktika kaj socia

1. Ĉar la Libera Penso ne povas kontentiĝi per nur spekulativaj opinioj, kiuj interesus nur la individuan penson, al ĝi apartenas doni regulon por vivo tiel al socioj kiel al individuoj.

Aplikate al socioj, ĝi estas la metodo, kiu konsistas voli submeti al la leĝoj del racio la socian organizon mem.

Socio, kiu inspiriĝas per tiu metodo, havas kiel unuan devon forigi de ĉiuj siaj publikaj servadoj (administracio, juĝado, instruado, helpado, k. t. p.) ĉiun eklezian karakteron, per kio oni devas kompreni, ke ĝi devas iĝi ilin ne nur neŭt alaj inter la diversaj religiaj eklezioj, sed fremdaj kaj malcedemaj por ĉiu religia influo, nepre ekskluziva kontraŭ ĉiu esprimita aŭ enkaŝita dogmatismo.

La kompleta laikeco de la regno estas nur simpla apliko de la Libera Penso al la kolektiva vivo del Socio. Ĝi konsistas disigi la Ekleziojn de la Regno, ne sub formo de divido de kapabloj inter du povoj traktantaj kiel ambaŭ egalaj, sed garantiante al religiaj opinioj la saman liberecon, kiel al ĉiuj opinioj, kaj rifuzante al ili ĉiun rajton sin miksi en la publikajn aferojn.

2. La Libera Penso, estante kompleta nur kiam ĝi entreprenas socie efektivigi la homan idealon, devas peni por



starigi regadon, sub kiu nenia homa estaĵo plu povos esti oferata aŭ eĉ malzorgata del Socio, kaj sekve ne plu estos metata aŭ lasata de ĝi, rekte aŭ pere, en praktika neebleco ekzerci ĉiujn siajn rajtojn de homo kaj plenumi ĉiujn siajn rajtojn de homo.

La Libera Penso do logike estas kreanto de socia scienco, de socia moralo kaj de socia estetiko, kiuj, perfektiĝante per la progresoj mem del publika konscienco, starigos justecan regadon : socia justeco estas nur racio aplikata del homaro al sia propra regado.

Alivorte la Libera Penso estas *laika, demokrata kaj sociala*, t. e. ĝi forĵetas, jel nomo de la indeco de la homa persono, tiun trioblan jugon : la malrajtan povon del aŭtoritato en religiaj aferoj, del privilegio en politikaj aferoj, kaj del kapitalo en ekonomiaj aferoj. *Trad. R. D.*

---

## ALVOKO

La Asocio « Paco-Libereco » sciigas nin, ke ĝi projektis eldoni Esperante la antireligian broŝuron del fama franca parolisto Sebastien Faure titolitan *Les crimes de Dieu* (krimoj de Dio). Ĝi alvokas la helpon de ĉiuj liberpensuloj por la baldaŭa presado de tiu broŝuro kaj ĝia disvastigo tra la mondo. Sendi la monon al la sekretario : Maison Commune du IIe, 49, rue de Bretagne, Paris.

---

# LIBERAJ PENSOJ

La granda industrio naskis en ĉiuj landoj novan klason, kiu, posedante nenion, havante nenian esperon posedi ion, ĝuante nenian el la bonoj de la vivo, eĉ ne la lumon del tago, ne timas, kiel la kampulo kaj la burĝo produktitaj del Revolucio, ke malamiko el ekstere venu ĝin senigi, kaj pro manko de riĉaĵoj defendotaj, konsideras la fremdajn popolojn sen teruro kaj malamo. Samtempe altiĝis sur ĉiuj vendejoj del mondo financaj potencoj, kiuj kvankam ili ofte ŝajnigas respekton del malnovaj tradicioj, estas per sia funkcio mem esence detruemaj por la patruja kaj nacia spirito. La universa kapitala organizacio kreis en Francujo, kiel ĉie alie la internacion de la laboristoj kaj la kosmopolitismon de la financistoj.

Anatole France *(Francujo, nuna aŭt).*

# NOVAJ ALIĜOJ

### Francujo

S-ro Delaroue, membro del Internacia komitato de L. P., maire de Melun.

S-ro Paul Terras, Combeyron (près Vernoux d'Ardèche).

### Rusujo

S-ro Georg Davidov, kesto, 12, Saratov, nune ĉe Dro Mermod, Lausanne, Svisujo.

Eksiĝis : So Galland, So Louis.

Entute : 114 membroj.

## ABONOJ 1908-9

Sekcio de la Ligo por la Rajtoj del Homo en Sens (Fr.).

S-ro Neupokojev, prez. de soc. Espero, Vladivostok, Asia Rusujo.

S-ro Andreo Fiŝer, Sudebnaja, 15, Tiflis, Kaŭkaza Rusujo.

S-ro D-ro F. Zarudzki, ĉe Sindikato, Proskurov (Podolio) Rusujo.

# KASO

| | |
|---|---|
| *Enspezoj* : Kotizo de Guillemin...... sm | 0.99 |
| — Terras............ | 0.99 |
| — Sebert............ | 0.99 |
| — Vaucher.......... | 0.99 |
| — Rapine........... | 0.99 |
| *Transportite*................... | 26.07 |
| SUME..... | 31.02 |
| *Elspezoj* : sendo del Decembraj bultenoj.. | 1.35 |
| Poŝtmarkoj............................ | 0.99 |
| SUME..... | 2.34 |

Restas en kaso : 28.68.

## Pagu senprokraste la kotizon por 1908-9

**Anoncetoj del anoj.** J. KELLER, kolonie Julienaue, *Bergstedt* bei Hamburg, korespondas kun vivspertuloj pri psikologio del pensado.

Laborista Presejo Esperantista
52, rue Thénard, Sens (Francujo)

FÉDÉRATION DU LIVRE
MARQUE SYNDICALE

186

BULTENO

DE

# LIBERA PENSO

Internacia Societo Esperantista de Liberpensuloj

JARO 1908-1909. — N° 7. Februaro

El la poemo de LURECO (Romo, la jarcento antaŭ J.-C.) « Pri la Naturo del Estaĵoj » :

## Laŭdo de Epikuro venkinto de Religio

Kiam antaŭ l'okuloj malinde homvivo kuŝadis
Tere, sub premega pezo del Religio,
Kiu kapon del ĉielregionoj elmontris,
Kun aspekto terura superregante la mondon,
Greka homo unue kuraĝis levi kontraŭe
Mortemulajn okulojn, unua ekstari kontraŭe.
Tiun nek famo de Dioj, nek fulmo nek bruo minaca
Del ĉielo haltigis, sed despli fervore incitis
Virton del animo, por ke li volu disrompi
Mem unua riglitajn pordojn de la naturo.
Lia do viva pensforto travenkis, eksteren
Longe iradis trans la flamaj muroj del mondo,
Kaj per mento kaj koro alpasis tra tuta senfino :
Li venkinto reportas al ni nun, kio naskiĝi
Taŭgas, kio ne taŭgas; kiel al ĉiu estaĵo
Estas fiksa povo kaj limo profunde plantita.
Kaj religio piedbatita nun siavice
Subpremiĝas : nin altigas la venko ĉielen.

*Trad.* R. DESHAYS.

Estas nun preparata traduko de paĝoj elektitaj el Lukreco en sammezuraj versoj.

# PENSOJ DE PROUDHON

**(Francujo 1809-1865)**

Mi konkvestis mian liberecon; mi jam laboras nur por la libereco del aliaj: ĉitiu mankas al mia feliĉeco.

—×—

Nenio estas por mi riĉiĝi, dum ekzistas malriĉuloj.

—×—

Koro kaj konscienco, jen la superega parto de la homo. Talento, inteligento, genio, tio ĉio nur poste venas.

—×—

Justeco sufiĉas al la socia ekvilibro; sindono estas superdeva. Feliĉa tamen tiu, kiu povos diri: Mi min donas.

—×—

Laboro, necesa por la socio kaj la homo, fortiganta la spiriton kaj la korpon, gardanto del moroj kaj del saneco, produktanto del riĉeco, principo de la progreso kaj elmontro de la homa agemeco.....

—×—

El ĉiuj edukaj sistemoj, la plej absurda estas tiu, kiu disigas inteligenton de agemo. Mi volus la instruadon kombinata kun la metia lernado, kies helpanto ĝi ne estas.

—×—

Kiu havas sian ideon en la kavo de la mano estas ofte homo pli inteligenta, almenaŭ pli kompleta, ol tiu, kiu ĝin portas en la kapo, netaŭga ĝin esprimi alie, ol per formulo.

—×—

La natura neegaleco malpliiĝas per la eduko, kaj foriĝas per la egaleco del havaĵoj. Ni asertas la eblecon del eduko del amasoj, tio estas, la eblecon de ĝenerala libereco, kaj de libereco pri laboro kaj kapitalo kiel pri leĝo.

—×—

Mi ne volas la popolan Herkulon pli ol la registan Hekulon.



Faru jel okazo, havigu, konsilu ĉiun eblan bonon, ne konsiderante la specon de registaro, kiu estras, kaj pro amo al la homaro.

—×—

Opozicia deputito pensus perfidi sian komision, se okaze li proklamus prava la registaron, tiel energie, kiel li akusas ĝin: tiaj estas tiuj petistoj de popolareco.

—×—

Homo povas ami sian similulon tiom, ke li mortu, li ne amas lin tiom, ke li laboru por li.

—×—

Ĉar vivo estas batalo, plej saĝe estas igi tiun batalon nia feliĉeco.

—×—

Despotismo estas tiel malfacile renversebla nur tial, ke ĝi sin apogas sur la intima sentado de siaj kontraŭuloj, mi devus diri, de siaj konkurantoj: tiom ke sincere liberala verkisto, vera amiko del Revolucio, tre ofte ne scias, kiuflanken li devas direkti siajn batojn, al la koalicio de la subpremantoj aŭ al la malbona konscienco de la subprematoj.

—×—

Kiu estas la fundamenta intuicio de la homa genio? La ideo de ekvilibro.

Ĉiuj prailoj del laboro estas specoj de levilo; tiu estas la senmova punkto, al kiu rekondukiĝas ĉiu industria faro: detur mihi punctum, et terram movebo.

Kiel, instigata del propramoveco, vekiĝis inteligento? Per neevitebla praktiko del analizo. Ĉiuj iloj del laboro estas analizaj iloj; ĉiu industria faro solviĝas je produkto aŭ rompo de ekvilibro.

La abstrakta ideo naskiĝis del necesa analizo del laboro: kun ĝi signo, metafiziko, poezio, religio, kaj fine scienco, kiu estas nur reiro del spirito al la industria mekaniko.

La plano de laborista instruado, sen manko de literatura instruado, kiu estas donata aparte kaj samtempe, estas do desegnita: ĝi konsistas, unuflanke, igi la lernanton sekvi la tutan serion del industriaj ekzercoj, irante del plej malfacilaj, ne distingante specialecon; aliflanke, eltiri el tiuj ekzercadoj la ideon en ili entenatan, kiel iam la elementoj del sciencoj eltiriĝis el unuaj instrumentoj de la industrio, kaj konduki la homon, per la kapo kaj la mano, al la filozofio del laboro, kiu estas la triumfo de la libereco.

*Trad.* R. D.

# NOVAJ ALIĜOJ

### Germanujo

S-ino Elisabeth Hüffmeier, Osterstr. 169, Hamburg.
S-ro Henry Meyer, Billwarder Steindamm 98, 1, Hamburg.
S-ro J. Neumann, Albertstr. 16, 3, Hamburg.

Eksiĝis : S-ro J. Keller.

Entute : 116 membroj.

# KASO

| | | |
|---|---|---|
| *Enspezoj* : | Kotizo de Roux.......... sm | 0.79 |
| | — F-ino Hüffmeier... | 0.94 |
| | — Neumann......... | 0.94 |
| | — Meyer............. | 0.94 |
| | — O. Bünemann por estonta ano..... | 0.94 |
| | — Ge-roj Wolf....... | 1.98 |
| | — kaj donaco de Davidov.......... | 3.96 |
| | *Transportite*.................... | 28.68 |
| | SUMO..... | 39.17 |
| *Elspezoj* : | Sendo de Jan. bultenoj......... | 1.72 |
| | Pago al la presisto (parto del konto Evstifeieff)........... | 23.76 |
| | SUMO..... | 25.48 |

Restas en kaso : 13.69.

## *Ne plu prokrastu la pagon de la malfruaj Kotizoj*

Laborista Presejo Esperantista
52, rue Thénard, Sens (Francujo)

186

BULTENO

DE

# LIBERA PENSO

Internacia Societo Esperantista de Liberpensuloj

JARO 1908-1909. — Nº 8. Marto

## El Bohema gazeto "Ĉas"

Se ni volus, ke la homo alkatenigita je piedoj al la muro de la malliberejo forkuru, estus ridinde. Kaj se ni volus, ke homo per nudaj manoj revoluciu kontraŭ la ĝendarmoj, estus tute certe senkonscieco. Sed se ni konus la leĝon, kiu ordonas ke la infano ĝis sia 14a jaro devas esti edukata en unu el tiuj de la ŝtato aprobitaj konfesioj, kaj se oni scius kiamaniere ĉitiu leĝo estas praktikata en tia ŝtato, kia estas Aŭstrio, kaj kiel ĝi estus eluzita en urbo havanta klerikalan animon kiel Wien, kaj ankoraŭ precipe kontraŭ bohema naciano, se oni ĉi-tion ĉion konus kaj se oni riproĉus al antiklerikala patro, ke li instruis aŭ instruigis siajn infanojn pri religio, estus vere tiel ridinde kiel senkonscience.

Mi volonte rakontos, kiamaniere mi instruadis miajn infanojn pri la religio. Eble mi povos tiel iomete helpi tiujn kiuj vivas en la samaj cirkonstancoj kaj kiuj tamen plezure sekvus voĉon de sia konscio.

Ĝis sia 14a jaro devas la infano posedi bezonajn « sciojn » pri unu el tiujn de la ŝtato aprobitaj religioj. Ĝis kiam tiuj kaj similaj paragrafoj ne estos forigitaj, ĝis kiam ne estos proklamita, plena libereco de l' konscio en aferoj religiaj kaj kontraŭreligiaj — ĝis tiam estas ĉiu riproĉo, dirita kontraŭ la patro antiklerikala kaj ateista, senmezura malsaĝeco. Kaj ĝis kiam la parlamento ne direktos sian agadon al tiuj celoj, ĝi restos demokrata kaj progresa parlamento sole laŭ la nomo.

Mi instruadis miajn infanojn pri la religio. Mi legis al ili mitologion de la malnova Testamento kaj mi klarigadis al ili samtempe mitologion de la antikvaj dioj grekaj : kaj la infanoj trovis, ke tiuj grekaj dioj estis pli belaj, kaj ke dum ilia regado estis sur la tero pli multe da suno. Mi klarigadis al ili la novan Testamenton, la vivon de Jezuo, la predikon sur

la monto, la parabolojn pri la riĉulo kaj Lazaro, pri la junulo, kiu estis tro riĉa, pri la amo al proksimuloj k. t. p., k. t. p. Kaj la infanoj diris al mi, ke tiam devis esti alie, ke Jezuo hodiaŭ sentus sin derelikta kiel arbo en la vasta kampo, escepte se li ne estus arestita de la policanoj, se la ŝtato ne starigus lin antaŭ juĝejon kaj la pastroj ne plendus je li, ke li detruas la religion — la pastroj katolikaj kaj protestantaj.

Kaj pluen trovis la infanoj, ke la mondo havas ĉiam sole Dion de l' malnova Testamento, Dion de l' glavo, de l' fajro, de l' pafilegoj, de la venĝo, maljustajoj, kolero, malbono, perforto, k. t. p. Kaj la Jezuo Kristo vane vivis kaj vane mortis. Unuvorte mi instruadis ilin tiel, ke ili ekkonu la enhavon de l' botelo, pri kiu mi al ili diris, ke ĝi enhavas venenon el Indio. Kaj la pastroj profesionistoj ekzamenis ilin kaj juĝis, ke ili posedas « scion ». Kaj ĉar al la pastroj kaj al la paragrafoj sufiĉas, se la infanoj posedas « scion », restis iliaj animoj puraj.

Kaj nun mi daŭrigas ilian instruadon pri religio. Mi klarigas al ili la historiojn pri la papoj, nacioj kaj ŝtatoj, kaj la infanoj rigidiĝas, ke tioĉi estis ĉio ebla, kiam tiaj homoj nomiĝis kristanoj. Kaj mi rimarkigas, okazintaĵojn de niaj tagoj — kaj oni juĝas, ke el tio ĉio, kion Jezuo volis kaj instruis, restis nenio, tute nenio.

Kaj ili trovis, ke homo, kiu kredas je Dio, bezonas nek parohestron nek pastron, nek preĝejojn nek ceremoniojn. Kaj ili havas tian opinion pri Dio, kiun mi neniam vidis, neniam aŭdis, neniam elsentis el esprimoj de iu parohestro aŭ pastro, de iuj apostoloj antikvaj kaj modernaj, de iu homo. Kaj ili estas justaj kaj bonaj kiel la floroj.

Kaj tiel ili ĉeestas mian laboron, miajn pensojn, miajn dolorojn.

Kaj illi havas sole unu sopiron, ke jam estu la tago, kiam ili ambaŭ estos dekkvarjaraj, ke oni propra manu plenigos la blanketojn per kiuj oni anoncas sian eksiĝon el la eklezio.

*Trad.* V. Riegel.

Rim. Tiu artikolo estis ŝtate konfiskita. Grava pruvo de nia presliberecο.

# LIBERA PENSO

« Libera vi nomas vin? Vian regantan penson mi volas ekscii kaj ne, ke vi liberiĝis de iu jugo.

Ĉu vi estas iu tia, kia rajtis liberiĝi de sia jugo? Ekzistas multaj, kiuj forĵetis sian lastan valoron forĵetante siajn servdevojn.

Libera de kio? Pro kio tio koncernus Zoroastron! Sed per luma brilo via okulo diru al mi : libera por kio ? »

La filozofo NIETSCHE dirigas tiujn vortojn al Zoroastro en la ĉapitro, kiu parolas pri la vojo de l' kreanto, kreanto liberiĝinta de la ĝisnunaj tradiciaj valoroj, kreanto de novaj vojoj kondukontaj al vero, bono, belo.



Ankaŭ ni, liberpensantoj en ĉiuj fakoj, devas demandi al ni : Por kio ni liberiĝis de tiuj opinioj kaj radikiĝintaj bazoj de l' sentoj, kiuj regis niajn gepatrojn, kiuj regas ankoraŭ la plej multajn nin ĉirkaŭantajn personojn ?

Ĉu ni estas ankoraŭ sur tiu ŝtupo, pri kiu en la sama ĉapitro Zoroastro diras : « Kaj se vi diros, mi ne havas plu komunan konsciencon kun vi, tio estos plendo kaj doloro? »

Ne, ni devas esti konvinkitaj, ke nia liberiĝo de l' tradiciaj valoroj ne estas plendinda nek dolordona : ĝi estis necesa por la aliro de celoj pli altaj, pli gravaj ol la ĝis nun aliritaj.

Ni konscias bone, ke tiuj valoroj, kiujn ni forlasis, religio kaj patriotismo, dum certa tempo enhavis ĉion, kio povis konduki al vero kaj bono : la religio (estas egale, kiu el la multaj) celis kaj parte ankaŭ atingis vivon laŭ moralaj principoj, kompatemon kun malfeliĉuloj, interfratan oferemon, kaj la patriotismo en ĉiu aparta lando apogis la speciallflankan etikan pensmanieron, la kuraĝon kaj la idealismon de ĝiaj enlandanoj.

Sed ni vidas klare, ke nek la religio nun povas atingi siajn celojn; ĉar ĝiaj mistikaj tradiciaj bazoj metafizikaj jam ne akordiĝas kun tio, kion kaj scienco kaj vivsperto instruadas al ni, nek la patriotismo, tio estas la celado al perfekteco, supereco de l' kulturo inter la limoj de nur unu lando, sufiĉas al ni; ĉar ni konscias, ke ekster tiuj limoj vivas civilizitaj homoj kiaj ni, homoj, kiuj havas tiom da rajto al nia frateca, homama sento, kiom tiuj, kiuj tute okaze naskiĝis kaj vivas inter tiuj limoj fiksitaj per arbitreco kaj kruelegaj militoj.

Ne povante solvi la problemon de l' vivo ĝis la lasta fundo, ni ne imagas arbitre ĉionpovan, ĉionregantan kreinto-konduanton de ĉio ekzistanta nek metafizikan ekziston de l'homa animo post la morto; sed ni serĉas laŭ gvido de l' scienco la kaŭzon de ĉio ekzistanta kaj de ĉio okazanta estante certaj, ke nia nekapableco klarigi multajn ekzistaĵojn, multajn okazaĵojn, havas sian kaŭzon en nia nekompleta kono de l' naturleĝoj, kono, kiu neniam povos fariĝi tute kompleta.

Rigardo al la estintaj tempoj montras al ni, ke ĉiuj religiaj sistemoj sin bazas sur la nescion de l' homoj, kiuj pliŝatas kredi ion neakordigeblan kun la racio ol konfesi, ke ili nescias kaj ĉiam devas plue esplori. Tiu sama rigardo al estintaĵoj montras al ni, ke ĉiu liberiĝo de antaŭaj ideoj laŭ evolucio de l' scienco plibonigis la socialajn kondiĉojn de l' homoj kaj helpis al la harmonia paca kunvivado, kaj tiu fakto admonas al ni, ke ni dediĉu nian tutan fervoron al la disvastigo de liberaj ideoj.

Ni do apliku la kuraĝon antaŭe necesan por apogo de l' alditaj mallarĝaj patriotismaj celadoj nun al niaj pli altaj celoj : justeco, etika bonfarto sur la tuta terglobo.

Nia konscienco liberiĝinta de peza mistika balasto kaj de egoismaj celadoj al paradizoj kaj similaj rekompencoj ne permesu al ni ĝui amuzojn, dum ĉirkaŭ ni kunhomoj ie ajn malsatas, frostas, pereas, sed ordonu al ni celadi ĉies bonon nur pro la bono mem, dediĉi la tutan nian liberan tempon kaj monon al bonfaroj al proksimuloj.

Tiam ni rajtas nomi nin liberaj kaj disvastigi niajn ideojn; ĉar ni scias, ke ni estas liberajn *por* io.

Oscar BÜNEMANN.

# NIA ENKETO PRI LA LEĜA STATO DE LA LIBERA PENSO

## De nia bohema korespondanto.

La bohema klerikala gazeto « Ĉech » publikigis post la katastrofo en Messino kaj en Kalabrio artikolon en kiu ĝi supozis « he Dio punis la urbojn scie laŭ deziro de iu diofendanto ».

Pri tiu klerikala « saĝeco » skribis bohemaj kontraŭklerikalaj gazetoj, kaj la redakcio de la gazeto « Volna Myŝlenka » (libera penso) elmontris en siaj vitrinoj vidaĵkartojn el la urboj trafitaj per la katastrofo. Al tiuj vidakartoj oni aligis citaĵojn el la katolika katehismo.

La ŝtata reprezentejo (kompreneble post la klerikala denunco) juĝis tion ofendo de l' religio, kaj ordonis la 12an de Januaro 1909 trarigardon per la esploranta juĝisto en la redakcio de l' gazeto « Volna Myŝlenka » kaj en la loĝejo de l' redaktoro Karel Pelant por konfiski la vidaĵkartojn, kiuj jam antaŭe estis forprenitaj el la vitrinoj. Samtempe oni invitis S-ron Pelant, al kiu apartenis la vidaĵkartoj, en la oficejon, por aŭskulti lin pri tiu « krimo ».

Tiaj kaj similaj aferoj estas en Bohemujo preskaŭ ĉiutagaj. La katolika religio kontraŭ ĉiuj leĝoj estas ŝtata religio, kaj oni neniam estas certaj, ke oni ne estos punitaj, pro la ofendo al la religio.

Laŭ la bohema gazeto Ĉas 13/1 1909.

J. U. C. Vaclav Riegel,
juristo, Praha.

# LA SOCIETO

**LASTA AVERTO.** Post la unua de Majo ni ENSPEZIGOS per la POŜTO la malfruajn kotizojn.

Ni ŝuldas al la presisto 31 sm, ĉar ni ricevis nenion de So Evstifeieff, kiun kredeble ne trafis nia letero. Aliparte 70 membroj ne pagis la kotizon por la *Societa jaro Aŭg. 1908. — Sept. 1909.* La bulteno plu povos regule aperi nur se ĉiuj pagos kaj 40 novaj membroj aliĝos. Se necese post la pago de la malfruaj kotizoj la kasisto pruntos ion ĝis ni revidos S-ron Evstifeieff ĉe la Barcelona kongreso.

Laborista Presejo Esperantista
52, rue Thénard, Sens (Francujo)

FÉDÉRATION DU LIVRE — MARQUE SYNDICALE

221

# BULTENO

DE

# LIBERA PENSO

**Internacia Societo Esperantista de Liberpensuloj**

JARO 1908-1909. — Nº 9. Aprilo

## EN SVISUJO

*(El Asociita Preso).*

En Berno, 23 Aprilo. — La 4-an de Junio 1908, S-ro Richter, inĝeniero el Zurich, estis farinta en Lucerno paroladon pri Monismo kaj Kristanismo, kiu estis juĝata ofendanta por la religiaj sentoj de la loĝantaro; li pasis la 21-an de Marto del nuna jaro antaù la Kantona asizjuĝantaro kaj kondamniĝis je du monatoj de malliberejo kaj je okjaroj de forpelo el la lando; Richter apelaciis, sed la du monatoj estis sankciataj. Oni anstataùigis la ok jarojn de forpelo el la lando, tio estas el Svisujo — kio por kantona tribunalo estis ekster kompetenteco — per ok jaroj de forpelo el la Kantono.

La kondamnito sin turnis tiam al la Federacia tribunalo, kiu ĵus pravigis lin, kaj malpravigis la katolikajn juĝistojn en Lucerno, ordonante la liberigon del paroladinto, kiu restis pli ol ok monatojn en malliberejo pro teologia opinio.

## LIBERAJ PENSOJ

Ni aljetas troofte sur la kalkulon del perfido kaj mallojaleco tion, kio apartenas al la malsaĝeco..... Mi vidis en la grandaj aferoj tiom da malprudenteco, obstinon tiel harditan por sin blindigi, volon tiel absolutan sin malsavi, amon tiel parian, tiel instinktan por malvero, abomenon tiel enradikigitan por evidento, kaj por ĉion diri, tiel gran dan, tiel miraklan malsaĝecon, ke kontraue mi emas kredi, ke ĝi klarigas la plimulton del dubeblaj kasoj, kaj ke perfido, trompo, krimo estas nur escepto.

EDGARD QUINET (Francujo, 1803-1875).

# POR LA LIBERECO DE PENSO

## MANIFESTO DEL KOMITATO DE SOCIA DEFENDO (FRANCUJO)

## AL LA OPINIANTARO

**Tiuj, kiujn oni persekutas:**

Pro kelkaj vortoj prenitaj el afiŝo inspirita del buĉadoj en Raon-l'Etape, tri knaboj, Johano Goldski, Petro Ruff, Johano Molinier, estis kondamnataj, en septembro 1097, je *unu jaro de malliberejo.*

Pro artikolo de revuo, en kiu estis denuncata la konduto de generalo komandanto en Marokujo, Vitor Méric estis, en septembro 1908, kondamnata je *unu jaro de malliberejo.*

Pro artikolo de literatura kritiko, en kiu li raportas romanon pri militistaj moroj, kies aŭtoro, Lucien Descaves, estis iam persekutata kaj absolvata Victor Méric estas ree *persekutata.*

Pro ĵurnalaj artikoloj, en kiuj ili esprimis sian opinion pri la buĉoferoj en Casablanka kaj la pafadoj en Nabonne, Miguel Almereyda kaj Eŭgenio Merle estis, ĉu kiel aŭtore, ĉu kiel administranto, ambaŭ kondamnataj en februaro 1908 je *du jaro de* malliberejo, en decembre 1908 je *unu jaro de malliberejo.*

Georgo Durupt, arestita en Villeneuve ĉar il diris al soldatoj ne pafi al fratoj, estis kondamnita je tri jaroj de malliberejo, kaj malgraŭ la voĉdono de la Ĉambro por amnestio, li, kiel Branquet, ne povis rehavi sian liberecon, pro malbonvolo de la senatanoj.

Pro desegno, en kiu oficiro estis karikaturata, Aristido Delannoy estis kondamnata, en septembro 1908, je *unu jaro de malliberejo.*

Pro artikolo, kiun li ne legis, publikigita en ĵurnalo, kies administranto li estis, Georgo Marchal estis, kiel administranto, *antaŭjuĝe arestata.* Kontraŭ tiu maljustaĵo, preskaŭ sen antaŭa ekzemplo, protestis ĵurnaloj apartenantaj al ĉiuj opinioj: La Liberté, La Croix, L'Intransigeant, Le Rappel, L'Événement, Le Soleil, Le Gil Blas, La Petite République, Le Soir, La Lanterne, L'Humanité, L'Acacia, L'Assiette au Beurre, La Liberté d'Opinion, Le Mercure de France, k. t. p., k. t. p.

La protestoj estis vanaj. Marchal restis en antaŭjuĝa mal libereco.

**Unuj estas en malliberejo.**

**Tiuj, kiujn oni glorigas:**

Ĉar li skribis, la 12an de Decembro 1877, al sia kolonelo, leteron, en kiu li deklaris *rifuzi obeon,* la majoro Labordère ricevis del *respublikanoj honoran sabron* kaj *elektiĝis en 1882 senatano,* post agitado, en kiu partoprenis Georges Clemenceau.

Ĉar li, en 1902 kaj 1906, rifuzis obei pri forpelo de religiuloj kaj inventaro de preĝejoj, leŭtenanto-kolonelo De Saint-Remy, komandantoj Le Roy, Ladurie, Héry, kapitanoj Spiral, Couderc de Foulongue, De Larminat, De Croy, leŭtenantoj Pottier, De Rose, De Boisfleury, k. t. p., estis unuj kondamnataj *je unu tago de malliberejo,* la aliaj absolvataj de militkonsilantaroj, kaj iliaj maldisciplinaj, ribelaj agoj gloriĝis del katolikuloj kaj naciistoj (kiel admiralo Bienaimé: *La disciplino havas limojn;* Eduardo Drumont: *Super la leĝo estas la konscienco;* Georges Berry: *Kiu rifuzus al tiuj oficiroj multe da admiro?* kolonelo De Soyer: *Estas leĝoj malnoblaj, kontraŭ kiuj oni devas ribeli.*

Kvankam li diris, la 6an de Decembro 1899, ĉe la Socialista Kongreso en Parizo: « Se la ordono pafi daŭrus, ho sendube, la pafiloj eble pafus, sed eble ĝi ne estus laŭ la montrita direkto »; kaj la 24an de Novembro 1903, ĉe la asizjuĝantaro en Yonne: « Ĉu la konscienco del soldatoj ne havas la rajton ribeli? » Aristido Briand restis *libera;* li estas hodiaŭ *deputito, gardisto de la sigeloj kaj ministro del Juĝistaro.*

Kvankam dum sia tuta vivo li denuncis la hontindaĵojn del kazerno, la buĉadojn del koloniaj militoj, per libro, ĵurnalo kaj parolo, kvankam li subskribis por la antimilitarista Kongreso en Amsterdam kaj trenis en koto la armeon dum la Dreyfusa afero, Georgo Clemenceau restis *libera;* li estas hodiaŭ *ministro del Internaj Aferoj, Prezidanto del Konsilantaro.*

**La aliaj estas en Potenco.**

Kian konkludon tiri el tiu etato?

Ni nin turnas al la rektaj konsciencoj, al la honestaj koroj. Ĉu ne estas en tiu malegaleco del faroj malaminda kaj ribeliga skandalo? La libereco de penso ne plu ekzistas. Ĝi estas anstataŭita per subpremo kaj arbitra aŭtoritato.

Al la publika opiniantaro apartenas aŭdigi la potencan proteston, kiu ĉesigos tiel monstran staton del aferoj!

La Agada Komitato.

# NOVAJ ALIĜOJ

S-ro V. HERLAS, Realka, Mlada Boleslav, *Aŭstrio-Bohemujo.*
S-ro Jaroslav DRASTA, sama adreso, *Aŭstrio-Bohemujo.*
S-ro BECK, profesoro, 19, rue Armand Barbès, Rennes, *Francujo.*
S-ro Francisco VALENTE, Bieberstr, 10, Hamburg, *Germanujo.*
S-ro Paul LINARES, H[to] S. Basilio, Cordoba, *Hispanujo.*

EKSIĜIS : S-ro MATTSON ; S-ro MONGEARD.

Entute : 119 membroj.

## KASO. — Marto

*Enspezoj :*

| | | |
|---|---|---|
| Transportite | sm | 13.69 |
| Kotizo kaj donaco de Moch | | 1.98 |
| — de Arnalot | | 0.99 |
| — de Meunier | | 1.19 |
| — de Mihich | | 0.99 |
| Donaco de Engst | | 0.99 |
| SUMO | | 19.83 |

*Elspezoj :*

| | | |
|---|---|---|
| Sendo de la februara bulteno | sm | 1.76 |
| Poŝtmarkoj, Kovertoj | | 1.10 |
| SUMO | | 2.86 |

Restas en kaso : 16.97.

## Aprilo

*Enspezoj :*

| | | |
|---|---|---|
| Transportite | sm | 16.97 |
| Kotizo de Lahdenpera | | 1.90 |
| — de Paillot | | 0.99 |
| — L. Beuve | | 0.99 |
| — E. Beuve | | 0.99 |
| — Herlas | | 0.99 |
| — Drasta | | 0.99 |
| — Linarès | | 0.99 |
| — Laisant | | 0.99 |
| — Beck | | 0.99 |
| — Kaj donaco de Matuszevski | | 1.55 |
| SUMO | | 28.34 |

*Elspezoj :*

| | | |
|---|---|---|
| Sendo del Marta Bulteno | sm | 2.68 |
| Poŝtmarkoj | | 1.78 |
| SUMO | | 4.46 |

Restas en kaso : 23.88.

Laborista Presejo Esperantista
52, rue Thénard, Sens (Francujo)

BULTENO

DE

# LIBERA PENSO

Internacia Societo Esperantista de Liberpensuloj

JARO 1908-1909. — N° 11. Julio

## Pri la Katolikismo en Francujo

EL ARTIKOLO DE G. SOREL *la Nuna Religio* EN LA *Revue de Métaphysique et de Morale* (FRANCUJO)

..... Oni konsideros nur tre limigitan kazon, tiu del Katolikismo en Francujo kaj oni sin demandos, kion povas rezervi al ĝi la historiaj okazoj, kiuj ŝajnas, je la nuna horo, vere nepraj. Oni povas hodiaŭ konsideri kiel tute certa, ke la batalado entreprenita inter la Regno kaj la Eklezio estas finota per la plena malvenko de ĉi-tiu : ĉiuj institucioj, en kiuj la Eklezio ankoraŭ havas ian influon, estos absolute laikigitaj. Oni povas eĉ pli antaŭen iri en la prudentaj antaŭvidoj. Ĉiuj estis surprizataj, vidante kun kia humila rezignacio la katolikuloj akceptis la leĝojn direktitajn kontraŭ ili. Antaŭ ja ne longe ili prenis militeman sintenadon, kantis la heroecon del prusaj pastroj, venkintoj de Bismarck, kaj minacis la registojn konduki ilin ĝis « Canossa ».

Kiam la malfacilaj tagoj venis, la kuraĝo mankis al plej fervoraj laŭdintoj del martiriĝo; eĉ okazis, ke pluraj el tiuj, kiuj plej aprobis la germanan Centron, sin rimarkigis per konsiloj singardegaj. Estas do kvazaŭ certa, ke la Eklezio sin submetos sufiĉe rapide. Ni devas nun ekzameni la rezultatojn de tiu modifo.

Mi jam montris ĉi-supre, ke malaperos la filozofiemaj, diskutadoj kiujn estis kaŭzinta la batalo; ĉar jam neniu havos

utilon uzi la konfliktojn inter la Scienco kaj la religio, jam neniu interesiĝos je la sofismoj, kiuj pasiigis niajn samtempulojn. La scienca emo regos sur sia propra kampo, tio estas, en la eksperimentejoj; la religia emo regos en la sanktejo; ĉiu sin okupos pri siaj aferoj, ne volante sin trudi en alies specialaĵon; la sciencisto ne plu pretendos pruvi ke la teologiisto eraras, kaj la teologiisto ne plus cenzuros sciencajn instruojn, kiujn li ne komprenas tre bone; fine oni miros, ĉar povis ekzisti tiom da malkompreniĝoj.

Kiam la Eklezio estos konstatinta, per la sperto de multoblaj malvenkoj, ke ĝi jam povas regi nenion profanan, kaj kiam ĝi sin alligos nur al siaj spiritaj institucioj, la Regno ne plu sin montros tiel nefidema komtraŭ ĝi kaj la leĝaro pri la religiaj monakaroj ne povos plu konserviĝi, ĉar ĝi ofendas multajn ideojn de juro tre elementajn. Evidente necesaj estis politikaj cirkonstancoj tre eksterordinaraj, por ke oni estu disiginta la kongregacion del Oratorianoj, kies membroj ne faras religian promeson.

La monakaroj renaskiĝos: la katolikismo ne povas esti sen ili, ĉar la monaka pastraro konservas la ekzemplon del kristana vivo kaj certtgas la teologian tradicion.

Tre longatempe la Eklezio kredis, ke ĝia plej bona klientaro konsistas el la kampara popolo, kaj mi diris, ke ĝi faris grandajn oferojn, por ligi al si tiun agristan amason; sed jen, ĉar la malbonaj tagoj venis, la kampuloj sin malligas de ĝi kaj eĉ fariĝas kontraŭ ĝi malkaŝe malamikoj. La pastraro ĉiumaniere penadas por repreni ian aŭtoritaton sur siaj antaŭoj fideluloj; sed ju pli ĝi laboras laŭ tiu direkto, des pli ĝi incitas kontraŭ si la pasiojn del radikaluloj, timantaj ke ĝi kreos balotan forton, kaj jurintaj al ĝi mortmalamon. Kun la tempo, estos ja necese, ke la Eklezio forlasu siajn politikajn kaj kamparajn entreprenojn; kiam ĝi ne plu kredos necesa flati iajn superstiĉojn, ĝi povos igi la religion multe pli alirebla por la kleraj klasoj.

Se la religio estas, kiel diris Hegel, kun arto kaj filozofio, la plej alta elmontro del viva spirito (p. 24), oni devas atendi, ke ĝia kampo multe malpligrandiĝos, kiam ĝi ne plu estos miksata kun ia magia postvivaĵo. Se, kiel instruas W. James, la religia eksperimento estas la fundamenta fakto, oni devas atendi, ke oni trovos la religion nur ĉe la homoj taŭgaj por



praktiki tiun eksperimenton. Kvantam tio, kion mi nomis la sakramenta eksperimento, estas multe pli facile alirebla, ol la vera religia eksperimento, priskribita de W. James, ĝi estas ja malproksime del uzebleco por ĉiuj; ĝi postulas ian mentan kulturon, kiu notinde superas tiun respondan al la piecaj libretoj; kio pli kaj pli aperos, kiam la superstiĉaj postvivaĵoj estos malaperintaj el la katolikismo.

Ĉar estas tre verŝajna, ke la religia vivo reprenos, ian tagon, sian antaŭan iradon en la monakejoj, kaj ĉar ne ŝajnas tre malfacila, ke la Eklezio donos al siaj fideluloj evangelian instruadon multe pli altan ol tiu, kiun ili nun ricevas, la duobla eksperimento, sur kiu staras la katolikismo, ne mankos estonte; kaj tiel la Eklezio restos, sed kun multa malgrandiĝo, dum preskaŭ ĉiuj ĝiaj defendintoj konsideris plivastiĝon.

*(Trad.* R. D.)

---

# LA SOCIETO

*Ni recevis :* de S-ro P. BUENEMANN tradukon de unu el la unuaj pordarwinaj verkoj de D-ro Arnold Dodel (Zurich); ĝi aperos en venonta n-ro.

De la « Ĝenerala Asocio de la Kuracistoj en Rumanujo » broŝuron klarigantan, ke la rumana kuracistaro ne partoprenos en la Internacia Medicina Kongreso en Budapesto pro la subpremado, kiun la Hungaroj ekzercas kontraŭ la rumanaj subuloj; el ĝi ni citos la jenajn tute ĝustajn konsiderojn :

« La moderna scienco havas kiel patrinon la liberecon de l'pensado kaj de l'agado. Se la popoloj ne estas gajnintaj tiun valoran donacon, se ĉiu scienculo devus esti brulita sur ŝtipfajro kiel Giordano Bruno aŭ kondamnita kiel Galileo pro la veraĵoj, kiujn li eltrovis, kien estus alveninta la moderna scienco ? La moderna scienco estas filino de la libereco kaj ĝi ne estas duonfilino. Per ĝiaj akiroj, ĝi larĝigis la konaron de l'homoj, forpelis la herezojn kaj siavice donis novajn kaj fortajn flugilojn al la patrina-libereco.

« Kiu tenas subpremata popolon, ne estas ankoraŭ enpenetrata de la grandaj veroj de l'scienco kaj ne rajtas paroli en

ĝia nomo. Kiu ne respektas la liberecon ds milionoj da homoj kaj ne permesas ilian naturan disvolviĝon tiu ne povas esti konscikvieta pastro de la scienco, ĉar li makulas ĝian fonton mem : la libereco ».

Unu membro donacis 2 sm sendotajn je la nomo de la Societo por la monumento konstruata je honoro de MICHEL SERVET en Vienne (Francujo); tie la liberpensema kuracisto kuraĝe batalis kontraŭ la pesto (1542) kaj verkis la libron « Christianismi Restitutio » pro kiu li estis dufoje kondamnita, de la Roma Inkvizicio en Vieno, kaj de la Kalvinistoj, kiuj vivbruligis lin en Ĝenevo (1553).

**AVIZO.** — Sendu proponojn diskutotajn ĉe la Barcelona kunveno.

# NOVAJ ALIĜOJ

S-ro Bronislav KUHL, Czernichow ap. Krakovo, *Aŭstrio-Galicio.*
S-ro Louis HINGLAIS, farmacisto, Sens, *Francujo.*
Eksiĝis : MADON ; THIEDEMANN.

Entute : 122 membroj.

Abonis : S-ro Ph. KALISKY, Esp. Konsulo, Londono.

## KASO. — Julio

*Enspezoj :*

| | | |
|---|---|---|
| Transportite | sm | 37.11 |
| Kotizo de Arnhold | | 0.93 |
| — Thiedemann | | 0.89 |
| — Hinglais | | 0.99 |
| Abono de Kalisky | | 0.95 |
| SUMO | | 40.87 |

*Elspezoj :*

| | | |
|---|---|---|
| Preso de tri bultenoj (Marto, Aprilo, Majo–Junio) | sm | 23.76 |
| Sendo del Bulteno Majo–Junio | | 2.88 |
| Poŝtmarkoj | | 0.79 |
| SUMO | | 27.43 |

Restas en kaso : 13.44.

FÉDÉRATION DU LIVRE MARQUE SYNDICALE
*Sekretario-kasisto :* R. DESHAYS, Sens (Yonne), *Francujo.*
Laborista Presejo Esperantista
52, rue Thénard, Sens (Francujo)

417

BULTENO

DE

# LIBERA PENSO

In'ernacia Societo Esperantista de Liberpensuloj

JARO 1908-1909. — N° 12. Aùgusto

## Klerika kontaŭleĝa Persekutado de senkonfesaj Instruistoj en Aŭstrio

Ankaŭ la Aŭstria leĝo (1867) garantias al ĉiu regnano liberecon de kredo kaj konscienco : la ĝuado de rennanaj kaj politikaj rajtoj ne devas dependi de eklezia konfeso. Sed kiam en lasta tempo bohemaj instruistoj S-roj Pelikan, Laube, Vildomec kaj F-ino Kaderabkova uzis tiun rajton deklarinte sin senkonfesaj, la imperiestra reĝa Landa Lerneja Konsilantaro en Bohemujo kaj Moravio pensiumis ilin. La katolika estraro ne povante apogi sin sur klara kaj justa leĝo fine eltrovis ruzan argumenton : la instruisto deklarinta sin senkonfesa perdas ĉe gepatroj de infanoj per li instruataj konfidon, kaj tiel fariĝas netaŭga por sukcesa funkciado en lernejo. Principo tre danĝera ne nur por instruistaro sed ankaŭ por ceteraj profesioj, kiu iniciatas rajtan necertecon kaj laŭvolon. La konfido de regnanoj estas ja tre ŝanĝema kaj ofte dependas de civilizacia stato de loĝantaro. Sed la puno ne atendis longe. La progresemaj gepatroj, kiujn oni tute ne demandis pri ilia opinio, ĉesas toleri similan ruzecon, kie ili devas ludi rolon de autaŭtuko de malhonestaj faroj. Antaŭ la persekuto de instruisto V. oni organizis kunvenon prezidatan de vilaĝestroj, kie oni subscribis kaj sendis al Lerneja Konsilantaro manifeston : « Ke instruisto V., kvankam li forlasis katolikan eklesion kaj ne eniris alian, tute ne perdis nian konfidon ; kontraŭe ni aprobas ĉitiun agon de honesta viro kaj senzorge transdonas al li edukadon de niaj infanoj. » La ministro de Instruado estis atentigita pri la afero. Ni sciigos al nia legantaro la rezultaton. R. F.

# LA SOCIETO

*Libera Penso* estas ĵus enskribita en la *Internacia Federacio de la Libera Penso* kies sekretariejo estas en Brucelo.

## EN BARCELONO

Precizajn sciigojn del Kongresestraro pri niaj du seancoj, kaj de niaj Barcelonaj amikoj pri akcepto de *Libera Penso* ĉe la lokaj liberpensaj societoj, ni ne ricevis ankoraŭ. Fidu temen, ke ĉio estos kiel eble plej zorge preparita. La societanoj kiuj venos (plej multaj, en la nunaj cirkonstancoj, ankaŭ por kuraĝigi la aliajn esperantistojn), venu se eble iom antaŭ la kongreso kaj informu pri sia Bacelona adreso la sekretarion de L. P.

## TAGORDO DE LA ĜENERALA KUNVENO

**Raporto de la Komitato.** — Jen la teksto, kiun prezentos la sekretario.

« Karaj Societanoj, ĉar en oficiala Raporto oni devas nepre sin gratuli pro io, ni gratulu nin tial, ke ni vivas. De nia lasta kunveno, ni kreskis iom, sed malmulte, de 100 anoj ĝis 124. Nia loka grupo en Beaune (Françujo) daŭras kaj laŭ ĵusaj informoj de F-ino Rouff povos baldaŭ vigliĝi. En Parizo ni entreprenis kun S-ro Bourlet starigi urban grupon, kaj ricevis proponojn por helpo de du famaj liberpensuloj, S-ro G. Hubbard jam esperantisto, kaj S-ro Charbonnel: sed diversaj cirkonstancoj prokrastis ankoraŭ la fondon. De Lausanne S-ro Eydelnanth sendis ankaŭ promesojn. Kaj ni esperas ke en Hamburgo nia agema samideano S-ro Oscar Buenemann estos baldaŭ varbinta sufiĉe da novaj anoj por formi tiean grupon.

« Ni havas tri Honormembrojn, Forel, Pelant kaj Tolstoj, kaj nia brava amiko Francisko Ferrer el Barcelono, kiu volis esti simpla societano, ne pro tio malpli nin honorigas.

« Nia bulteno ĝis nun estas nia sola vivelmontro. Ĝi enhavas tro de francaĵoj, pro manko da aliaj komunikoj. Tamen ni publikigis 3 artikolojn el Bohemujo kaj unu el Anglujo, Germanujo, Moravio kaj Rusujo ; aperis ankaŭ personaj korespondaĵoj de S-ino Hueffmeier, S-roj Watters kaj Oscar Buenemann.

« Nia ekstera agado konsistis nur el sendo de artikoloj al francaj ĵurnaloj, inter kiuj kelkaj ilin presis, en monofereto por la monumento al Michel Servet, fine el nia enskribiĝo en la Internacian Liberpensan Federacion.

« Necesa konkludo de tiu tro mallonga raporto estos, ke ni devas nun plenkreski. Ni estas ĉitie serĉontaj la plej praktikajn rimedojn. Sed scias ja liberpensuloj, ke ne sufiĉas la decidoj del kunvenoj aŭ la bonvolo del komitatoj sen la persona agado de ĉiuj kunlaborantoj. »



**Kontoj de la Sekretario-kasisto.** — Oni facile sekvis sur la bulteno la kalkulojn. En tiu societa jaro (20 Aŭgusto 1908–1 Sept. 1909) ni ricevis de la membroj, inter kiuj kelkaj aldonis ion al la regula kotizo, kaj de la abonintoj, sm 90.30 ; kun la resto del antaŭa jaro 12.83, la enspezita sumo estas 103.13. Aliparte ni elspezis por la preso del bulteno 64.83, por papero kaj poŝtkostoj 37.92 : sume 102.75.

Restas ja neniom (38 sd.) kaj ankoraŭ ni ŝuldas la preson de ĉitiu mem numero. Sed ni tuj enspezos kelkajn malfruajn kotizojn, kaj aliajn por la komencata jaro. Ree ni gratulu nin, ĉar ni vivis per niaj solaj rimedoj.

**Diversaj proponoj.** — *1e* De S-ro D-ro Batek : elekti du rezervajn komitatanojn por anstataŭi la eksiĝontajn (Okt. 1908).

*2e* De S-ro Wolf : fondi garantian grupeton de 12 anoj por certigi regulan aperon de la bulteno; ĉiu el ili garantiu la elspezon necesan por unu numero (proksimume 8 sm jare), kaj pagu tiun sumon en specialan kason; el tiu kaso la deficito estu pagata ciujare, kaj la anoj repagu la 12an parton de tiu deficito (Aŭg. 1909).

(Alia propono de S-ro Wolf pri elekto de ĉiunacia korespondanto estas jam alprenita en Dresdeno).

*3e* De S-ro Oscar Buenemann, kaj Elisabeth Hueffmeier : ke ni laboru laŭ iomete pli difinita programo, kvankam oni tion povus eble opinii kontraŭa je la dua paragrafo de nia regularo. Certe ĉiu, kiu aŭdas pri liberpensuloj, komprenas tion tiel, ke la aludata persono laŭ religia vidpunkto forpuŝas ĉion metafizikan prenante kiel bazon de siaj esploroj al ĉiuj demandoj kaj de sia edukado al la nova generacio nur la rezultaĵojn de la vera sperto persona aŭ scienca kaj rifuzante ankaŭ ĉiun hipnotisman sugestadon al niaj cerboj (pompo de l' preĝejoj kc) dum la esplorado al iuj problemoj. Laŭ politika vidpunkto oni ĝenerale ja komprenas la vorton laŭ la senco, ke liberpensulo ne konsideras, ke iu institucio havas la rajton bari la liberan vojon de l' pensado. Eble oni povus redakti flugfoliojn kiuj estus sendotaj al la sekretarioj de l' diversaj landoj aŭ urboj, kaj la sekretarioj dissendos aŭ disdonos ilin kiel eble plej grandnombre ne nur por altiri novajn anojn, sed ankaŭ por veki intereson kaj helpon por nia movado ĉe personoj, kiuj nek estas nek fariĝas anoj. Tiom, kiom la leĝoj de l' landoj allasas tion, ni povus eble eldoni alvokon instigantan la personojn eksiĝi el la eklezio (en la hamburga respubliko la eksiĝo estas tre facila, kaj oni povas eviti al la infanoj la religiinstruon en la lernejoj; en Prusujo, kvankam iomete pli komplikata, la eksiĝo estas preskaŭ same facila, sed oni ne povas forteni la infanojn de la religiinstruo en la lernejoj). Tiam nia agado havus praktikan valoron forprenante de l' pensmalliberigaj institucioj iom da teritorio.

*4e* Interesaj por diskuti estos ankaŭ la deziroj esprimitaj de S-ro Watters (N° 3, Okt. 1908) pri agado de la societo por morala senteologia edukado.

*5e* La aliaj proponoj skribe alsendotaj aŭ buŝe prezentotaj.

**Tempo kaj loko del Ĝenerala kunveno 1910.** — S-ro Wolf proponas, se la 6a Kongreso de Esperanto okazos en Usono, ke la Ĝenerala Kunveno de nia Societo okazu (en 1910 en Bruselo, samtempe kiel la Internacia Kongreso de Liberpensuloj.

**Elekto de du Komitatanoj.** — Laŭ la Regularo, la Centra Komitato renoviĝas po unu triono ĉiujare. Ne estas nun necese loti la nomon de la du eksiĝontaj, ĉar memvole eksiĝis unue S-ino Hankel jam post la Dresdena Kongreso, due S-ro Engst, kiu ĵus informas nin pri sia decido, kies motivo estas manko de tempo.

La du eksiĝintaj estas germanoj. Jen la nombro de membroj el la diversaj landoj : Francujo 48 (loka grupo en Beaune 10); Germanujo 16; Bohemujo kun Moravio 11; Svisujo 10; Anglujo 9; Hispanujo 5; Aŭstrio 4; Rusujo 4; Bulgarujo 2; Finnlando 2; Grekujo 2; Galicio 2; Argentino 1; Brazilujo 1; Hungarujo 1; Danujo 1; Holando 1; Italujo 1; Norvegujo 1.

Estas reprezentataj en la Komitato Svisujo (Sro Wolf, prezidanto, kiu laŭ svisa principo, ne volas resti prezidanto), Francujo (S-ro Deshays sekretario-kasisto), Anglujo (F-ino Fryer), Bohemujo (D-ro Batek).

LA VOĈDONO PER LETERO ESTAS PERMESATA. — Andresu la bileton al la sekretario, S-ro Deshays, Kongreso de Esperanto, Barcelono, antaŭ la 5a de Septembro.

# NOVAJ ALIĜOJ

S-ro Karel KLAŜKA, studento de Pedagogia Instituto, SOBESLAV, Bohemujo.

S-ro Zohumil KLAŜKA, studento, KARD. REĈICE, Bohemujo.

Entute : 124 membroj.

**Abonoj.** — S-ro D-ro Fr. UHLMANN, HUTTWIL, Svisujo.

## KASO. — Aŭgusto

| | | |
|---|---|---|
| *Enspezoj :* | Transportite ........................ sm | 13.44 |
| | Kotizo de Korpelainen .................. | 1.94 |
| | Kotizo 1909-1910 de O. Buenemann ....... | 1.05 |
| | — — F-ino Hueffmeier ........ | 1.05 |
| | Abonoj de Fiŝer kaj Neupokojev (per librejo Warnier) .................... | 1.78 |
| | SUME ..... | 19.26 |
| *Elspezoj :* | Sendo del Julia bulteno ............. sm | 4.28 |
| | Poŝtmarkoj ........................... | 0.79 |
| | Kovertoj ............................. | 0.99 |
| | Preso del Aŭgusta bulteno ............ | 8.50 |
| | Sendo del Aŭgusta bulteno ............ | 4.32 |
| | SUME ..... | 18.88 |

Restas en kaso : 0.38.

*Sekretario-kasisto :* R. DESHAYS, Sens (Yonne), *Francujo.*

Laborista Presejo Esperantista
52, rue Thénard, Sens (Francujo)

589

BULTENO

DE

# LIBERA PENSO

Internacia Societo Esperantista de Liberpensuloj

JARO 1909-1910. — N° 1. Septembro

## POR TOLSTOY KAJ POR FERRER

Ĉe la du ekstremoj de Eŭropo ekzistas hodiaŭ du landoj, en kiuj la libereco de la penso, kaj sekve ĉiuj liberecoj, estas premegataj kaj kruele kondamnataj. En Rusujo, nia glora Honormembro, LEV TOLSTOY, estas nun persekutata : ne kuraĝante aresti respektatan maljunulon, la Cara registaro forkaptis kaj ekzilis lian tro fidelan sekretarion kaj amikon. En Hispanujo, profitante la ribelon de l' laborista popolo kontraŭ la maroka militiro, la klerika kaj reakcia potenco fermis ĉiujn laikajn lernejojn, kaj postulas la kapon de nia plej agema ano, Francisko FERRER.

Nu estas la devo de la INTERNACIA ESPERANTISTA SOCIETO "LIBERA PENSO", kies utilecon kaj baldaŭan disvatiĝon tiuj ambaŭ apostoloj jam de l' komenco komprenis, protesti kontraŭ agoj, kiuj ne taŭgas haltigi la progreson de l' ideoj, sed sukcesas nur inciti la koleron de l' popoloj kaj la honton de l' pensuloj.

Ne povante, pro momentaj malfacilaĵoj, ĝustatempe organizi efiikan agadon, ni petas niajn ĉiulandajn societanojn persone subteni per aliĝo, per monero, per obstinaj klopodoj, la movadon de universa indigno jam sufiĉe minacan por cedigi la tiranecon.

Por la Komitato de Defendo de l'viktimoj de l' hispana reakcio, sin turni al la Ĝenerala Sekretario, S° Charles Albert, 15, rue du Parc Montsouris, Paris.

# Religio de l'Estonto

De ANTONIN SOVA

Tiu tempo nin naskigis, kiam ombro mezepoka
Sur homaro peze kuŝas altrudante sklavan ĝenon.
Hereditaj superstiĉoj kaj kutimoj mallumigas;
Sola devo ŝajnas inda : preni mensogantan maskon.

Malhumilaj ĉefpreĝejoj, miro de antikvaj urboj,
Estras kiel en estinto, arkojn alten ellevante.
Povo marŝas tra la placo rakontante pri Fiero,
Nun ankoraŭ ĝi aĉetas ĉarmon, homojn nudigante.

Movo de necerta gajno kaj mizero ĉiutage
Bolas en foirejego, ĝi katenas nin, rampaĵojn ;
Dume maltrankvila sprito venteganta en altecoj
Penas venki malhelpaĵojn, naĝi en profundegaĵojn.

Tamen, se ni akre vidis, se ni uzis ĝustan vorton,
Ni jam povis trovi fratojn, decidintajn kune iri ;
Ni eĉ povis vidi sunon bonfareme radiantan,
Arogantan kanajlaron vidi pro tagiĝo miri :

Sang, homaron ne sanigos, dio estas surda vorto,
Nur humana religio ligu bordojn de l' abismoj ;
Per ĝi servutulo lernu el katenoj sin eligi ;
Brakon de libera viro fortikigu virinamo.

*El bohema lingvo Tradukis*
RUDOLF FRIDRICH.

# LA SOCIETO

Pro diversaj malfacilaĵoj, la Ĝenerala Kunveno de LIBERA PENSO ne okazis dum la Kongreso en Barcelono. Laŭ decido de la Prezidanto, la voĉdonado estos farata perletere dum dumonata periodo. Nia precipa tasko por la komencanta jaro estos klopodi por alpreno de Esperanto kiel oficiala lingvo de la Internacia Federacio de Libera Penso. De nun la Societanoj devas do pripensi pri vojaĝo al Bruselo kaj partopreno ne



nur en nia Ĝenerala Kunveno, sed en la Internacia Kongreso de Liberpensuloj por subteni la proponon, kiun esperebIe ni sukcesos enskribigi en la tagordon per la naciaj federacioj. Aliparte la Internacia Ekspozicio altiros Bruselon multe da esperantistoj : tiel estos plej favora okazo por nia duobla propagando.

*Ni ricevis* kaj rekomendas kiel liberpensan plej interesan verkon la broŝuron de S-ro Bruijn (170 Kepplersraat, HAGO, Nederlando). *Naŭ historioj pri l'Aŭtoritato, laŭ Multatuli.* Prezo : 4 sd.

# NOVAJ ALIĜOJ

S-ro Eugène PRIOU, 36, Grande Rue, SENS, Francujo.
S-ro DEMOULIN, employé au Chemin de fer, BEAUNE, Francujo.
S-ro Tercavin GUARRO, str. S. Lorenzo, 89, SABADELL, Hispanujo.

Entute : 127 membroj.

**ABONO.** — S-ro Louis A. ORSATTI, 1536 Sansom str., PHILADELPHIA Pa., Usono.

. . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . .

ĈI-TIUN VOĈDONILON DETRANĈU, PLENIGU, kaj SENDU

*antaŭ la Ia de Decembro al la Sekretario*

*Revidu la detalon de l' proponoj sur la lasta numero*

| | |
|---|---|
| Raporto de la Komitato : *aprobate* aŭ *malaprobate*. . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . | |
| Kontoj de la Sekretario-kasisto. . . . . . . . . . . . . . . | |
| Propono pri rezervaj komitatanoj . . . . . . . . . . . | |
| Propono pri garantia grupeto . . . . . . . . . . . . . . . . | |
| Propono pri disdono de flugfolioj. . . . . . . . . . . | |
| Propono pri agado por senteologia edukado. . | |
| Propono (nova, de S^o Deshays) por alpreno de | |

## KASO. — Septembro

| | | | | |
|---|---|---|---|---|
| *Enspezoj :* | Reportite | | sm | 0.38 |
| | Kotizo 1908-1909 de | Nuidant | | 0.99 |
| | — — | Menneveau | | 0.99 |
| | — — | Coppenet | | 0.99 |
| | — — | Fromageot | | 0.99 |
| | — 1909-1910 | Desmoulin | | 0.99 |
| | — — | Fryer | | 1.»» |
| | — — | Uitterdyk | | 1.19 |
| | | | SUME | 7.52 |
| *Elspezoj :* | Poŝtmarkoj | | sm | 1.»» |
| | Leterpapero | | | 0.12 |
| | | | SUME | 1.12 |

Restas en kaso : 6.40.

*Sekretario-kasisto : R. DESHAYS, Sens, Francujo.*

*Jarkotizo, kun la monata bulteno, 1 sm. (Fr. 2.50)*

.................................................................

la francaj famuloj Anatole France kaj Ferdinand Buisson kiel Honormembroj ..........

Tempo kaj loko de nia Ĝenerala Kunveno 1909-1910 : propono por koincido kun la Internacia Kongreso de Liberpenso en Bruselo....................................

Elekto de du Komitatanoj kaj, se plaĉas, de du rezervaj. Estas proponitaj ĝis nun S-roj Oscar Buenemann (German.), Fridrich (Morav.), Guillemin (Franc.), kaj S-ino Hueffmeier (German.). F-ino Rouff (Franc.) proponita deklaris, ke ŝi ne povus akcepti ............

Laborista Presejo Esperantista
52, rue Thénard, Sens (Francujo)

749

BULTENO

DE

Libera Penso

Internacia Societo Esperantista de Liberpensuloj

JARO 1909-1910 — N° 3. Novembro

# LIBERA PENSO

Rigardante la ĝeneralan vivadon de l'homoj, iliajn ideojn pri bono kaj malbono, la motivojn de ilia respekto kaj timo kaj konsiderante aliflanke la ĝeneralajn ideojn kaj dogmojn, kiujn precipe la ekleziaj, sed ankaŭ la ŝtataj instruaj institucioj celadas doni al la homoj, ni ekvidas grandan malakordon.

La nuntempa rolo de l'eklezio kaj de l'pensmalliberigaj ŝtataj institucioj estas nur, subteni tradiciajn instituciojn, kiuj gajnigas monon al personoj ne laborantaj por ĝia akiro aŭ ne alcelantaj per sia agado la altajn celojn, kiujn oni supozas al ili kaj kiuj donas gloron kaj privilegiojn al personoj, kiuj tion neniel meritas.

Por certigi al si tiun ĉi potencan pozicion, la eklezio havas la plej grandan intereson, konservigi malgraŭ la evidentaj rezultajoj de la scienco la superstiĉon, la rekompencteorion pri postmorta vivo, la malklerecon, la tradiciemon kaj la sekonscian vivadon, kaj akordiĝante kun la registaroj, ĝi alcelas fari el la homo facile regeblan, kredeman, aŭtoritatadoreman kaj humilan regnanon.

Por atingo al tiu celo la sugestado estas la plej efika kaj plej uzata rimedo. Ĝin uzas la EKLEZIO, kaptante la infanojn de la plej frua aĝo per sugesta religia instruo, altrudante al ili la rekompencteorion, kiu igas ilin juĝi siajn agojn laŭ puno kaj rekompenco atendata, per religiaj senĉese ripetadataj kantoj kaj limigante la natursciencan instruon, poste enmiksante sin en la privatan vivon de l'homoj

je ĉiuj gravaj vivokazoj kaj daŭre efikante sur la homon per la hipnotismo de l'preĝeja pompo kaj muziko.

La ŜTATO, glorigante dum la instruo al la infanoj ĉiujn kruelajojn kaj buĉadojn de l'pasinta tempo, donante nimbon al ĉiu tronposedanto, kaj posedinto, venenigante la infanojn per patriotaj kantoj kaj enspirante al la homoj militeman spiriton, kiu igas ilin blindaj kontraŭ la plej granda hontindaĵo de nia kulturo : la milito.

Samtempe tiuj instituciaj (ekleziaj kaj ŝtataj) asertas, ke ili donas la bazon de ĉiu moralo. Sed kia tiu moralo povas esti, se ĝi dependas de la privataj monaj interesoj de certaj kastoj, kiuj certigas al si daŭran despotismon? Ni vidas la rezultaĵojn : la pligrandigon al la diferencoj, inter la valorigo al ĉiu homo, la ekspluatadon al multaj de kelkaj, la profitavidegan konkurencon, inter la komercistoj, la prostitucion, la limigon al la libera opiniesprimo kaj la inklinon de l'homoj, humile servi kaj riverenci pro mono.

Moralo povas esti bona nur, se ĝi estas sincera ; ĝi estas sincera nur, se ĝi bazas sin sur la natura instinkto de l'homo : «egoismo» edukita tiamaniere, ke ĝi ne toleru maljuston aŭ malbonon, sed celu ĉiam nur harmonion, bonfarton por ĉiuj. La homo devos konscie senti, ke ĝi ne povas farti bone, se ĉirkaŭ ĝi regadas maljusto, senklereco, malsano, kaj ĝia egoismo mem devas postuli pli bonan staton. Tamen tiu pli alta vidpunkto de l'homoj pri la respondemo kontraŭ la socio ne povas esti atingata tiom longe, kiom regas tiaj ekonomiaj statoj, kiaj ili estas nune: tio estas, tiom longe, kiom la posedaĵo — plejgrandparte en la formo de l'mono — estas la centro de l'vivo. Nur kiam la aparta posedaĵo ne havos plu la nunan valoron, la homoj povos esti pli sinceraj unu kontraŭ la alia kaj kontraŭ la granda socio.

Ni do vidas, ke tiuj ŝtataj kaj ekleziaj institucioj ne estas akordigeblaj kun vera kulturo ripozanta sur scienco kaj celanta individuan bonfarton por ĉiu homo. Pro tio nia unua celo devas esti la *Apartigo al la Eklezio kaj la Ŝtato*. Ni povas atingi tiun celon nur per tio, ke ni, liberpensuloj, tute fervore instigas la personojn al la eksiĝo el la eklezio (precipe la virinojn, edukontajn ja grandparte la novan generacion); ĉar nur tiam la eklezio perdos sian nunan potencan pozicion, se la nombro de ĝiaj anoj plimalgrandiĝos.

Plue ni devas protekti la novan generacion, kies moralaj leĝoj — kiel ni tre intense esperas — havos tute sanan kaj naturan bazon, kontraŭ la influo de l'eklezio (kiom eble ankaŭ de l'registaro) kaj ĝiaj sugestoj kaj, kie la leĝo permesas tion, liberigi la infanojn de tiu edukado.

Individue ni pensu kaj agu, ne ĉiam nur sekvante la publikan opinion, mem ne esplorante la gravajn vivdemandojn. Ni estu memkonsciaj kaj ne falu en la tenton, lasi nin influi per kaj de sugestoj. Ne hipnotismaj imagoj, enusgestitaj opinioj kaj laŭtradiciaj kutimoj regu niajn intencojn, nian pensadon, nian agadon, sed nur faktoj pruvitaj per la propra sperto aŭ pripenso kaj per la scienco. Neniun aŭtoritaton ni adoru : nek rangan, nek tradician. Kontraŭ la tradicio ni devas batali ankoraŭ eĉ en la medio de l'liberpensuloj; ĉar ne ĉiuj, kiuj liberiĝis el la eklezia influo, jam povis liberiĝi el la kutimoj, antaŭjuĝoj kaj eĉ dogmoj de la tradicio, ĉu en la privata, ĉu en la publika vivo. Bedaŭrinde la tradiciaj valoroj plaĉas ankoraŭ tre multe al la oportunemo de l'homoj. Pro tio ni instigu la personojn, ne tiom time konservi la morojn de l'prapatroj: ĝenerale nenio el la «bona antaŭa tempo» estas imitinda.

Jen niaj celoj. Tiajn vastajn kaj tamen tiom urĝe realigindajn celojn ni povas atingi nur per internacia organizacio kaj per individua praktika agitado de ĉiu ano.

E. HUFFMEIER kaj O. BUNEMANN.



# LA SOCIETO

**El la loka Grupo en Beaune (Francujo).** — La Beaunera Grupo de «Libera Penso» protestas energie kontraŭ l'asasino de Ferrer. Ĝi esperas, ke monumento baldaŭ staros al la gloro de l'suferinto de la klerika malamego. Ĝi kolektis por tio la sumon da 16 fr.

— Tute imitinda aperas la iniciato de niaj sameclanoj en Beaune, precipe post la malnoblaj kalumnioj per kiuj la mortigintoj penis malpurigi la memoron de l'viktimo. Aliparte la sekretario de «Libera Penso» alpreniĝis kiel ano de l'komitato starigita de la franca Ligo por la defendo de la Rajtoj de l'Homo je la celo dediĉi monumenton al Ferrer sur placo en Parizo : li transdonos al tiu komitato la monon kolektotan de la societanoj.

**El Parizo.** — La kongreso de la nacia Asocio de l'francaj Liberpensuloj, en kiu partoprenis kelkaj anoj niaj, unuvoĉe esprimis la deziron, ke la Internacia Kongreso en Bruselo (1910) akceptu **Esperanton** kiel oficialan organon de la universala Liberpensularo, speciale en la kongresoj.

## NOVAJ ALIĜOJ

S-ro Frans SCHOOFS, 49, Kleine Beerstraat, Antwerpen, Belgujo.
S-ro Emilo GASSE, 55, rue Fr. Bellanger, Le Havre, Francujo.
S-ro Fr. RITZ, fervoja direktoro, Huttwil, Svisujo.
S-ro E. MATHIEU, Montbard, Francujo.
S-ro Paul RENARD, rue d'Abrantes, Montbard, Francujo.
Entute.: 133 membroj.

## KASO. — Novembro

Por pli plena ĝusteco la kalkuloj estos nun esprimataj per frankoj, kiel ili necese estas farataj ; nur la sumoj prezentiĝos per spesmiloj.

| | | |
|---|---|---|
| *Enspezoj* : | Reportite (8.85 ₷) | Fr. 22.35 |
| | Anonima donaco | 20.»» |
| | Kotizo de Dauphin | 2.50 |
| | — Humberset | 2.50 |
| | — Schoofs | 2.40 |
| | — Gasse | 2.50 |
| | — H. Meyer | 2.65 |
| | — Mathieu | 2.50 |
| | — Renard | 2.50 |
| | — Kluge (1908-9 kaj 1909-1910) | 4.90 |
| | — Blangarin — | 5.»» |
| Vendo de broŝuroj Pledo por Ferrer | | 56.45 |
| | SUME | 126.25 |
| *Elspezoj* : | Poŝtmarkoj | 3.»» |
| | Kovertoj | 3.20 |
| | Sendo de l'Oktobra bultenoj, kun broŝuro al gazetoj | 12.10 |
| | Saldo al la presisto en Sens (2 n-roj de l'bulteno) | 43.»» |
| | Transportoj kaj sendoj de broŝuroj Pledo por Ferrer | 17.60 |
| | SUME | 78.90 |

Restas en kaso : 47.35.

**Ŝuldoj.**— Al esp. presejo en Chalon-sur-Saône (Francujo)

| | |
|---|---|
| 1e 4733 broŝuroj | 260.30 |
| 2e Oktobra bulteno (500) | 19 » |

**Deponite ĉe ĵurnaloj kaj vendistoj** : 2645 broŝuroj.

*Sekretario-kasisto : R. DESHAYS, Sens, Francujo*

*Jarkotizo kun la monata bulteno : 1 ₷ (Fr. 2.50)*

Presejo BALANDRA & ROYER, Chalon-s-Saône (Francujo)

R Deshays

BULTENO

DE

# Libera Penso

Internacia Societo Esperantista de Liberpensuloj

JARO 1909-1910 — Nº 4. Decembro

# LA LIBERPENSAJ INSTRUISTOJ

## en AŬSTRIO kaj FRANCUJO

### 1e. — El letero de morava instruistino.

En nia lando Moravio estas nun tre malbonaj rilatoj. Precipe la lernejoj kaj la instruado trovas sin en danĝero esti tute okupitaj de klerikuloj. Instruisto, kiu kuraĝas eliĝi el katolika eklezio, devas tuj forlasi sian profesion. Ĉiu pli libera esprimo de penso estas persekutata kun disciplinaj ekzamenadoj.

Kontraŭ tio batalas plimulto da geinstruistoj, kiuj estas asocitaj en granda instruista societo. Je tiu ĉi jaro estas ĉe nia instruista societo fondita speciala fako nomita «La Libera Lernejo», kies celo estas batalo kontraŭ reakciaj influoj.

Precipe mi volus sciiĝi, kiel la francaj instruistoj laboris por liberigi sin de tiuj influoj. Ĉu ili antaŭe propagandis inter si tiun ĉi penson, kaj poste per publikaj paroladoj inter ceteraj homoj?

Ĉe ni la regado kaj la influaj oficoj estas ankoraŭ en klerikaj servoj, kaj tial la kontraŭklerika laboro iras tiel malrapide. Tiuj, kiuj kontraŭbatalas, ne povas atingi tiel facile progreson kiel tiuj, kiuj estas en klerikaj servoj. Tial oni trovas plimulte da senkarakteraj homoj, kiuj kontraŭ sia konvinko estas tamen batalantoj en klerika partio.

Lasttempe mortpafis sin unu studento en instruista instituto, ĉar la klerika direktoro kaj ceteraj membroj de instruista korporacio ekzamenis tre severe kaj tute maljuste lian kamaradon pro kontraŭklerikaj vortoj, kiujn li tute ne diris. Tiu ĉi studento defendis sian kulunon ankaŭ ĉe katehisto. Tiu ĉi insultis lin maldelikate, instigis tutan instituton kaj lian familion kontraŭ li, kaj ĉar li tiel ne povis vivi, li mortpafis sin. Lia kamarado tute maljuste estis eksigita de instruista instituto. Tiel oni edukas estontajn instruistojn.

## 2e. — Respondo de l'sekretario de LIBERA PENSO

Estimata Kolegino,

Kun korprema intereso mi legis la detalojn kiujn vi donas al mi pri la situacio farita en Moravio al la liberpensaj instruistoj : tio nur tro konsentas kun la komunikoj de nia korespondanto aperintaj en nia bulteno de Aŭgusto 1909, montrantaj la hipokritan farmanieron de la aŭtoritatoj, kiuj en Bohemujo pretendis forigi la liberpensajn instruistojn kiel perdintajn pro disiĝo de l'eklezio la konfidon de l'gepatroj.

Kiel venki la subpremon? ne estas niaj konsiloj — konsiloj ja malprecizaj al unuiĝo kaj energio — eĉ ne estas nia ekzemplo de ni francoj, kiu taŭgos ĝin konigi al vi, tiel diferencaj estas la situacioj! Tamen ne estos seninterese por vi, almenaŭ malrekte, kompreni kia estis en Francujo la politika rolo de l'instruistoj : ĉar tie estas la nodo de la demando.

Mi ne parolas al vi pri la duagrada instruado, kiun mi plibone konas ĉar mi partoprenas en ĝi : ĝi restis ĝis hodiaŭ, krom kelkaj bruaj esceptoj, sendependema sed timema, konscienca sed burĝema, sen efiko al la regno kaj sen influo en la lando.

Tute alia estis la karaktero kaj la sorto de la unuagrada instruisto. La antiklerikalismo estis por la respublika partio la viva punkto de l'programo kaj ĝi fariĝis por la radikala partio la granda regrimedo. Je 1881 la ministraro Jules Ferry fondante la unuagradan instruadon senpagan, laikan kaj devigan, enmetante en ĝin la moralon, igis Lernejo.., kontraŭ senigita Eklezio, la fortikajo de la moderna Regno : la instruisto anstataŭis la pastron ĉe la knabo kaj lin kontraŭbatalis ĉe la civitano, ĉe la elektanto: nomita de la prefekto (ministrejo de l'internaj aferoj), li estis la fidatulo de l'Respublika Registaro, kaj la agento de l'radikala kandidato.



Dank'al la instruistoj la radikala partio atingis la potencon kaj fine plenumiĝis la laboro de moderna racio, la Disigo de l'Eklezioj kaj de l'Regno.

Sed dum la venko donis al niaj bravaj batalantoj, kun tronecesa plialtigo de ilia materiala kaj morala situacio, nur pli da fido kaj fervoro je la demokrata progreso, ĝi koruptis la elektitojn : kaj per troaj postuladoj, personaj tiranaĵoj kaj evidentaj malfidelecoj, la interligo sanĝiĝis je netolerebla servuto.

Jen kial hodiaŭ la instruistoj, grupigitaj en siaj Amikaroj aŭ eĉ Sindikatoj, defendas sian sendependon kaj siajn ideojn ĉiam decide antaŭenemajn kontraŭ la eksprotektantoj forgesintaj siajn principojn, kaj kiuj, eĉ en la fina batalo de la liberigita Eklezio kontraŭ la laika Regno, nur malenergie subtenas la kulpigitajn instruantojn. La parlamento, dum la jusa semajno, rifuzis la amnestion al instruisto forpelita pro kulpo de opinio; prefekto, antaŭ kelkaj monatoj, oficiale demandis du sindikatistajn lernigistojn « kion ili estus voĉdonintaj » pri antimilitarista mocio prezentita en kongreso, kie ili ne partoprenis!

Pli kaj pli aperas, ke la batalo, en Francujo kiel ĉie, nun estas transportita sur la socian kampon : eĉ se ili malamas la pastraron, la burĝoj timas precipe socialismon; la amaso de l'instruistoj staras por la laboristoj kontraŭ la kapitaluloj : ili estas de nun suspektataj.

Kaj tie ja, kiel mi pensas, estas ankaŭ ĉe vi la fondo de la demando; sed tiu bloko de l'tradicioj kaj privilegioj, kiu penas ĉi tie por sin refari, restas ĉe vi ankoraŭ fortika. Ne do, kiel ŝajnas, per propra politika agado, sed per ĝenerala progreso kaj en komuna liberigo vi triumfos.

# LA SOCIETO

La skriban voĉdonon partoprenis nur 13 membroj. Ĉiuj proponoj estas aprobitaj de la plimulto, unuvoĉe tiuj pri rezervaj komitatanoj kaj disdono de flugfolioj, apenaŭ plimulte tiuj pri garantia financa grupeto kaj agado por senteologia eduko.

Estas elektitaj komitatanoj S-roj Oscar Buenemann (Germano) kaj Guillemin (Franco), rezervaj komitatanoj S-ro Fridrich (Moravo) kaj S-ino Elisabeth Hueffmeier (Germanino.)

La titolon **Honormembro** afable akceptis S-ro Ferdinand BUISSON, franca deputato, organizinto de la laika unuagrada instruado, fidela batalanto por la primitiva radikala programo kaj ĉiuj liberecoj.

Dank'al iniciato de nia kolego Schoofs kaj helpo de la societo « Juna liberala Gvarelio de Zurenborg » (*Antwerpen*, Belgujo), Libera Penso eldonas *flandran tekston de la Pledo por Ferrer* en broŝuro je Fr. 0,10. Profitojn duone dividus inter si la du societoj; malgajnon garantias mem S-ro Schoofs.

## NOVAJ ALIĜOJ

S-ro Josa MAREŜ, ĝenerala sek. de Ĉiostudenta Asocio, banurbo LUHAĈOVICE, Aŭstrio-Moravio.
S-ro Ludovic RODO PISSARO, 14, rue Girardon, Paris, Francujo.
S-ro B.-F. SCHUBERT, Bureau of Pensions, WASHINGTON D.-C., Usono.
S-ino Ida S. KURTZ, 1505 North Capitol str., WASHINGTON D.-C., Usono.
S-ro J. MARIETTE, Cleguer (Morbihan), Francujo.
S-ro RICHARD P.-J., 11, rue du Midi, Hyères (Var) Francujo.
S-ro Johano VILARDELL, str. Poniente, 11, Sabadell, Hispanujo.
S-ro N. HRISTOSKOFF, str. I.-C. Bratianu 5, Bukureŝto, Rumanujo.
Entute 141 membroj.

## *KASO. — Decembro*

| | | |
|---|---|---|
| *Enspezoj* : | Reportite | Fr. 47.35 |
| | Kotiso de Stroele | 2.40 |
| | — Rodo Pissaro | 2.50 |
| | — Ladevèze | 2.50 |
| | — Richard | 2.50 |
| | — Baudoin (parte) | 2.00 |
| | — Hristoskoff | 2.40 |
| | Vendo de broŝuroj Pledo por Ferrer | 17.45 |
| | Sume | 81.60 |
| *Elspezoj* : | Sendo de la Novembra bulteno | 11.25 |
| | Poŝtmarkoj | 2.00 |
| | Kovertoj | 1.95 |
| | Sendoj de broŝuroj | 1.55 |
| | Sume | 16.75 |

Restas en kaso : 64.85 = $ 25.68.

**Ŝuldoj.** — Konto de la presisto 26 Dec. Fr. 294.40.

**Deponite** ĉe jurnaloj kaj vendistoj 2730 broŝuroj.

**AVISO. — Pagu senprokraste la kotizon 1909-1910.** Anoncu, disvendu broŝurojn. Sendu kolektmonon por la monumento al Ferrer.

*Sekretario-kasisto : R. DESHAYS, Sens, Francujo*
*Jarkotizo kun la monata bulteno : 1 $ (Fr. 2.50)*

Presejo BALANDRA & ROYER, Chalon-s-Saône (Francujo)

BULTENO

DE

# Libera Penso

Internacia Societo Esperantista de Liberpensuloj

JARO 1909-1910 — N° 5. Januaro

# KONTRAŬ LA MILITO (M. Engelgardt)

Kiam iu malfeliĉa homo, pro spirita malklerajo aŭ ia tempa (persona) malbonfaritajo, faras al iu cetere grandan krimon, tiam ĉiuj indignas kontraŭ li kaj eĉ estas pretaj lin disŝirigi je pecetoj. Sed tiaj mortigistoj, kiel Napoleono, kiuj dum sia tuta vivo sin okupas je mortigado de homoj estas glorigataj de tiuj samaj homoj, kiuj indignas kontraŭ la bedaŭrinda krimulo...

Sed ĉiam ŝajne la homaro iĝas pli prudenta kaj nobla iom post iom. Kaj tio jam estas sukceso, la homoj penantaj senkovrigi la malmoralajn ideojn en la luksa uniformo de la belŝajnaj malkonsciajoj. Do, en sia, animoj la homoj hontas, kaj tio jam estas bona antaŭsigno. La unuatempaj kruelbestoj — la regimentestroj kaj iliaj kunuloj ne hontis. La egiptaj faraonoj post ruinigo de tutaj landoj, estas eternigintaj siajn kruelajojn per piramidoj kaj sfinksoj kiujn oni ornamadis per bildoj, reprezentantaj veturilojn plenigitajn per dehakitaj manoj kaj piedoj; kun surskriboj, per kiuj tute malkaŝe oni diradis : « Mi egipta reĝo, pereigis tiom kaj tiom da homoj, la maljunulojn mi ne ekkompatis, la infanojn mi ne ekbedaŭris, la urbojn mi forbruligis, la kampojn mi elĉifis, miru vi miajn faritajojn, postularo! » (1).

Nun neniu sin laŭdas per tiaj faritajoj kaj neniu sin glorigas per ili. Pri ili oni silentas. Neniu volas diri : Napoleono estas eminenta, ĉar li pereigis du milionojn da homoj,

---

1. Tiajn bildojn kaj surskribojn oni estas konservintaj sur la unuatempaj egiptaj kaj asiriaj monumentoj.

li elverŝigis dek milionojn da k. gr. da homa sango, li ruinigis kaj dezertigis tiajn kaj tiajn regionojn. Tiajn faritaĵojn oni eĉ ne ripetas, kvazaŭ ili eĉ ne ekzistus. Li ne mortigis, ne ruinigis, li «glorigis, superigis, disportadis famon» k.c., k. c. Pli frue oni diradis : eminenta estas, **ĉar** li mortigadis.., nun oni diras : eminenta estas **malgraŭ tio**, ke li mortigadis. Pli frue en la sama mortigo oni vidadis bravaĵon, nun la mortigon oni abomenas, kaj nur penas ĝin pravigi iel. Sed kiam oni povas havigi al si neniajn motivojn per kiuj pravigi ĝin, krom malplenaj babilaĵoj kaj kalumnioj, do, ĝi pruvas, ke la militistara afero jam subfalas. Ne hodiaŭ, tiam morgaŭ la malkonsciaĵo kaj frenezaĵo de tiaj praviga̗oj fariĝos videblaj ankaŭ por la plej malkleraj kaj trivialaj homoj.

Kiel oni elrigardas laŭ ĉio, Eŭropo estas en la antaŭvesperiĝo de unu tia trabriligo. La movado kontraŭ la milito kaj militarismo, kaj por la utilo de la paco kaj senarmiligo, la forrifuzoj de militservo (1) de la flanko de individuaj personoj aŭ grupoj da homoj, — ĉio ĉi alprenas lasttempe tian larĝan horizonton, allogas tiom da multaj aliĝantoj kaj predikantoj, ke la defendantoj de la «glavo kaj sango» komencas kvazaŭ ŝajne timi, por ke oni vere ne naskigu ion neatenditan de tio. Kompreneble laŭ tiuj homoj la ideo por la eterna paco restas, same kiel antaŭe, la vana fablo, « utopio » sed ili scias tre bone, ke tio, kio hodiaŭ ekzistas, estis hieraŭ utopio, kaj la hodiaŭa utopio povas morgaŭ efektiviĝi. Saman kaj nome tian karakteron ekkomencas alpreni la utopio por la eterna paco : ĝi ankoraŭ ne estas enkorpigita en la vivo, sed ĝi jam estas enpenetriginta sufiĉe profundajn radikojn en la homa vivo.

Eltirita el la revuo « Vazrajdane » (Renask.) El bulg. lingvo, Nikif. Hristoskoff.

# PENSOJ

Pensoj de Ernest RENAN, jus retrovitaj en plano de nefinita romano.

Mi kredas je la faro de l'modernaj tempoj. Tio ĉi eĉ estas eble mia plej bona kreddeklaro, la plej ĝusta, tiu al kiu mi min reportas plej ofte.

1. En Bulgarujo, dank'al la tieaj kuraĝaj samcelanoj, jam okazas tre oftaj forrifuzoj por militservo ĉia ajn. (Rimarko de l'tradukinto).



— La vivo estas tro mallonga. Ni bezonus unu vivon por ami, unu vivon por scii, unu vivon por bone agi ; ho ve ! kaj se oni volas ami oni devas preskaŭ forlasi scion, kaj se oni volas scii, oni devas preskaŭ forlasi amon. Tio estas krudela.

— La senmorteco de l'animo fariĝis plifunesta ol utila al la progreso de l'homaro. Ĉar, antaŭmetinte la senmortecon, ne plu estas tiel peninda klopodi por restarigi la justecon en tiu-ĉi vivo : tio fariĝas tie alte. Tiam la malindulgaj katolikoj estas pravaj. Nia bazo estas ke ni devas agi kvazaŭ la estonta vivo ne estus, ĉu ĝi ekzistas ĉu ĝi ne ekzistas. Prediki al la popolo la estontan nevivon, tio estas servi al ĝi ĉar tio estas ĝin eksciti peni en la estanto. Prediki al ĝi la estontan vivon, tio estas ĝin dormigi, kaj eble ĝin trompegi, igi ĝin perdi ĉion por kurigi ĝin al vanaĵo.

— Iam la grandaj homoj vivis je l'elspezoj de l'aliaj. Aleksandro, Napoleono estis grandaj malestimante la homan genton. Tio ne plu estos.

— Ni ne devas serĉi konstanton en la Historio. Tuj kiam evoluaĵo atingis sian maturecon, la putro komenciĝas. La regado de Julio estis ĉe sia matureco je 1840. De tiam la malbono, kiun ĝi entenis fariĝis ĉiutage pli netolerebla. Ĝis tiam ĝi estis kaŝita per la malrapida kresko. La malbono ne aperas dum la kreskada periodo, sed tuj de la matureco, ĝi senmaskiĝas.

— Mi mortas en la religio de l'estonto.

Trad. R. D.

La rajtoj kaj la leĝoj ia konstante
Transpasas kvazaŭ malsanec'ĉiama :
Al idoj kaj praidoj treniĝante,
Nerimarkate, restas la enhavo sama.
Suferojn kaŭzas, kio estis beno :
Prudento nunc malprudent'fariĝis.
Ve al la idoj ! Leĝo estas ĉeno,
Se ne samtempe ĝi kun ni naskiĝis.
(El : Goëthe, "Faust")

Kiun religion mi konfesas? Neniun el ĉiuj, kiujn vi citas al mi. Kaj kial neniun? Pro religio !
(Diro de Schiller.)
TRAD. O. BÜNEMANN.

**AVIZO. — Sendu senprokraste la kotizon : ni devas tuj pagi la ŝuldojn.**

## LA SOCIETO

### La Komitato por la Jaro 1909-1910

*Prezidanto :* S-ro Jules Wolf, La Chaux-de-Fonds (Svisujo).
*Vicprezidanto :* S-ro D-ro A. Batek, Pizen (Bohemujo).
*Sekretario-kasisto :* S-ro R. Deshays, Sens (Francujo).
*Komitatanoj :* F-ino Helen Fryer, 39 Calais gate Camberwell park, London (Anglujo).
S-ro Oscar Bünemann, ĉe firmo Hugo Hartig Neuerwall 44, Hamburg 36 (Germanujo).
S-ro A. Guillemin, Chalet Esperanto 92, sente des Blanches, Houilles S.-&-O. (Francujo).

## NOVAJ ALIĜOJ

F-ino Ant. JANALIKOVA, instruistino, Bystrice-Hostyn, Aŭstrio Moravio.
S-ro Methodêj CHYLA, Prostêjov, Aŭstrio Moravio.
S-ro Léon ROSENSTOCK, ul. Basztowa 27, Krakow, Aŭstrio Galicio.
F-ino C. BEYNARD, av. des Ecoles 30, Villemomble, Seine (Francujo).
S-ro L. FERENCOWICZ, str. Chmielna 71, Varsovio (Polujo).
S-ro Mihai TIMUŜ, Rosiori (Ilfov) (Rumanujo).
Entute 147 membroj.

## KASO. — Januaro

| | | |
|---|---|---|
| *Enspezoj :* | Reportite | Fr. 64.85 |
| | Kotizo de Timuŝ | 2.40 |
| | — Janalikova | 2.40 |
| | — Cornet | 2.50 |
| | — Roux | 2.50 |
| | — Hinglais | 2.50 |
| | — Grosset (2 jaroj) | 5.00 |
| | — Baudoin (kompletigo) | 3.00 |
| | — Mahn (2 jaroj) | 5.00 |
| | — Kaule (2 jaroj) | 5.00 |
| | — Mariette kun kolekto 1908-09 | 5.00 |
| | — Kuhl | 2.50 |
| | — Rosenstock | 2.50 |
| | — Fridrich | 2.45 |
| | — Chyla | 2.45 |
| | Sume | 110.15 |
| *Elspezoj :* | Sendo de la Decembra bulteno | 10.65 |
| | Poŝtmarkoj | 2.50 |
| | Poŝtenspezigoj | 1.95 |
| | Sume | 15.10 |

Restas en kaso, Fr. : 95.05 = ₷ 37.59.
Ŝuldoj : Konto de la presisto 26 Dec. 294
— — 11 Jan. 18.10 = 312.50 (₷ 123,72).

*Sekretario-kasisto : R. DESHAYS, Sens, Francujo*
*Jarkotizo kun la monata bulteno : 1 ₷ (Fr. 2.50)*

Presejo BALANDRA & ROYER, Chalon-s-Saône (Francujo)

Deshays

129

BULTENO

DE

Libera Penso

Internacia Societo Esperantista de Liberpensuloj

JARO 1909-1910 — No 6. Februaro .

# La Mensogo de l'Almozo

*(Pri la Francaj superakvigoj)*

Patroninaj Moŝtoj, almozpetantaj Sinjorinoj de la alta mondo, ne, mi ne povas vin alsolvi; miksiĝas al via fervoro tro da memama vanteco, tro da bezono montriĝi, tro da koketeco. Vi parolas pri filantropeco kaj pensas nur pri la reklamo, pri la interrilatoj, pri la rimedoj okupi profite por via gloraĉo libertempojn al vi faritajn de privilegiaj situacioj. Ne laŭdebla estas via interveno sur la kampo de l'helpado, ĉar ĝi malaltigas la sentojn kaj falsas ĉiun ideon pri justo kaj maljusto.

« Denove unu tertremo », diris junulino pri la katastrofo ĉe Messina septembro 1908, kia feliĉo, oni jam povos dancadi! Jes, Fraŭlino, vi povos danci, kiam okazos piuaj malfeliĉegoj; viaj patrinoj organizos bonfarajn balojn, loteriojn per viaj malnovaj pupoj kaj la ornamaĉoj de viaj roboj; estos bufedoj kie vi dejoros kiel vendistinoj, kaj vi pasos de mano al mano, lasante kaj reprenante la bravkon de la danculoj, dum tuta nokto da junaĝa senzorgeco. Kiom da sendormaj horoj tamen estos kostintaj viaj plej etaj puntajoj al aliaj tiomjaraj junulinoj, kaj kiom el ili, per tiaj laboradoj, fordifektis la okulojn!

Vi jus povis, Fraŭlino, peti vian patran Moŝton vin konduki al la Pariza Opero, aŭ al la Komikopero, aŭ al la

Franca Teatro, aŭ ankaŭ alien, ĉar oni ĉie organizis solenajn prezentadojn profite de la superakvitoj. Tiel, maksimumo de mizero ĉe la suferintoj de la ruinigaj akvoj estos respondita ĉe vi al maksimumo de l'ĝojo. Ho, mi ne volus vin malbeni, sed vere, el kia ŝlimo formiĝis via koro, el kia koto via cerbo? Ĉu vi puraj ne ruĝigas tiel riĉe ornamiĝi, kiam viaj malĝojaj fratinoj kaj iliaj infanetoj frostotremas, timoplenaj, sen tukoj, sen lito, sen tegiloj? Ĝis kiam estos necese, por ricevi de vi kaj de viaj familioj kelkajn monerojn por malfeliĉuloj, prezenti al vi distrajojn kiuj kostas dekoblon, dudekoblon, centoblon de tio, kion gajnigos, post subtraho de l'elspezoj, la prezo de la eminenta loko, kiun vi estos okupinta? Ho, vi estas ja la degenerinta frukto de barbaraj civilizacioj!

Iom ni matematiku, mi petas. Kiam vi pagas centkvindek frankojn sesseĝan loĝion en Opero, por unu el tiuj ridindaj solenfestoj, kiuj estas arta kaj mora hontodaĵo, ĉu vi scias, ke restos ne multe pli ol dudekfranka monero al la profitontoj de la prezentado, dum cetero disprediĝos per mil lertaj aŭ burleskaj eltrovoj por pliigi vian ĝuon? Je tiuj kondiĉoj, kion vi estus respondinta, se oni estus dirinta al vi: «Spezu la tuton de la centkvindek frankoj, kiuj estas via superfluo, en nian helpan kason, kaj nenion retenu por viaj plezuroj. Ĉu estus nekapabla bonfari al malfeliĉo ne postulante ion interŝanĝe?»

Mi ne parolas nun persone, ankaŭ ne sentimentale; sed ĉe la terura realaĵo kiu nin subpremas, kontraŭ la vero kiu sin entrudas, estas ja necese ke mi tion diru, se oni estus al vi prezentinta tian inviton, vi estus rifuzinta doni vian monon. Ne protestu: se vi estus kapabla je tiel simpla memforgeso, de longe la kutimo de la bonfaraj festegoj estus malaperinta. Tiuj festoj, kio estas, se ne la skorioj de rafina kaj barbara civilizacio?

Ni pliprofundiĝu en vivaĵon de l'demando. Tiujn etajn sumojn, kiujn la riĉuloj rifuzus donaci sen kompenso, tiujn ili ŝuldus laŭ ĝustega justeco, kaj kune multajn aliajn pli grandajn. Ili ŝuldus ilin kiel elpagon pro nekalkuleblaj malprofitoj kiujn ili kaŭzis; ĉar se estas katastrofoj kiujn oni povas diri ekskluzive rezulto de la blindaj naturfortoj kontraŭ kiuj ni restas senarmaj, ekzistas aliaj nepre plimultaj kiujn ni taŭgos antaŭscii, kaj sekve kiujn la individuoj aŭ la registaroj, sub sia respondeco, devas malokazigi aŭ bari.

La grandega kresko de l'rivero Seine (Sen), kies terurajn efikojn ni ĵus suferis, estus estinta nek tiel violenta nek



tiel subita, se, de jarcentoj, vastegaj arbaroj ne estus detruitaj. Ĉu por la profito de l'humilaj kamparanoj aŭ de l'premegataj proletarioj permesiĝis kaj brute fariĝis tiuj hekatomboj de belegaj arboj? Ĉu plivere ne estus tial ke la posedantoj de tiuj miloj da arbaraj hektaroj volis tuj al si aljuĝi la longatempan produkton de l'internaj sukoj de la tero, kaj monigi dum kelkaj jaroj arbojn kiuj de plej antaŭaj memoroj estis, por la lando, sanigo, sendaĝerigo, freŝigado, unuvorte ornamo neesprimeble bela, utila kaj majesta.

Kiu havis la precizan devon malhelpi la senarbigojn? La registaroj kiuj personigas je ĉiuj epokoj la tiel nomitajn direktantajn klasojn, tio estas la riĉecan aristokrataron, la financan nobelaron. Sed la registaroj konsistas el posedantoj, ili faras leĝojn favore de l'posedantoj, ili havas fetiĉismon por la posedo, kvazaŭ la tero ne apartenus al ĉiuj.

La malgranda Svisujo, kiu ŝajnas rideti je siaj diafanaj lagoj, je ĉiu el siaj kaskadoj, donas al ni ekzemplon de saĝa antaŭzorgo. Arbara regularo devigas la loĝantojn neniam forhaki arbon ne tuj plantante alian por ĝin anstataŭi. Se oni volus fari en Parizo kvaronon de la defendkonstruoj efektivigitaj, ĉe la fluo de Aar kaj Rhein, de la svisa registaro, neniam plu estus timindaj enpenetroj aŭ ekokupoj de la akvoj.

Ni devas publikigi protektajn leĝojn kontraŭ la kapitaluloj kiuj riĉiĝis detruante niajn arbaregojn perde de l'tuta nacio, kaj kiuj sin kredas kvitaj kaj senŝuldaj kontraŭ siaj fratoj kiam ili pagis, por sia plezuro, iom pli ol laŭ la kutima tarifo, kaj tiel donacis panpeceton al la suferintoj, siaj viktimoj.

El la franca ĵurnalo «La République syndicale».

---

*El privata letero de germana verkisto citita en la franca gazeto «La Grande Revue».*

Pri mia nova dramo mi ankoraŭ nenion povas diri precize. Tio dependas nek de ni, nek de la direktoroj, sed de la polico: ĉi-tiu ne jam permesis ĝin, kaj trovas plezuron ĉiumaniere ĉikanante kaj retenante dum semajnoj teatraĵon, al kiu ĝi pretendas havi kontraŭdirojn.

Berlino fariĝas ĉiutage pli «rusa» kaj ni marŝus tie ĉi rapidire al la nuligo de ĉia penslibereco, al la forgeso de ĉiuj garantiitaj rajtoj. Se nia registaro, konsente kun la imperiestro kaj la nobeleta partio daŭrigas manovri kiel ĝi nun faras, estos baldaŭ revolucio.

## LA SOCIETO

EL LA REGULARO : Ĉiu kotizo ne pagita dum la unua jarkvarono (Sept.-Dec.) estas enspezata per la poŝto, kaj la prokrastinto devas pagi la poŝtajn kostojn.

La Kongreso de la INTERNACIA FEDERACIO DE LIBERA PENSO okazos en Bruselo *21-24 Aŭgusto 1910*; ni baldaŭ fiksos, je la sema tempo, la daton de nia Ĝenerala Kunveno en Bruselo, kie okazos ankaŭ Universala Eksposicio kun grava parto Esperantista. De nun prepariĝu !

Transdoniĝis al la Komitato de la Ligo por la Rajtoj de l'Homo la mono kolektita ĉe nia Grupo en Beaune. Fr. 19.50 (₷ 7.80).

## NOVAJ ALIĜOJ

S-ro F.-J. SANDECKI, U. E. A. delegito, str. Ujazdowska, 6. Varsovio, Polujo-Rusujo.
S-ro J.-H. VICH, P. O. box 184, Cleveland, Ohio, Usono.
S-ro Fr. RAMBOUSEK, Slerzsa 14, Kral. Vinohrady, Bohemujo.
FABRIKO « GLOBUS », Prestejov, Moravio.
Eksiĝis D-ro Rapine, S-ro Castoldi, S-ro kaj S-ino Schwengeler-Dunner.

Entute : 147 membroj.

## KASO.

| | | |
|---|---|---|
| *Enspezoj* : | Reportite | Fr. 95.05 |
| | Kotizo de Sandecki | 2.40 |
| | — Rambousek | 2.50 |
| | — Matuszewski | 2.80 |
| | — Ferencowicz | 2.50 |
| | — Fabriko « Globus » | 2.40 |
| | — Engst | 2.50 |
| | — Guillemin | 2.50 |
| | Vendo de unu N°. | 0.25 |
| | Kolekto de Guillemin | 0.65 |
| | SUME | 113.55 |
| *Elspezoj* : | Sendo de l'Januara bulteno | 10.70 |
| | Kovertoj | 1.40 |
| | SUME | 12.10 |

Restas en kaso. Fr. : 101.45 = ₷ 40.01.

Ŝuldoj al presisto 294 kaj 18.10 kaj 18.10 = 330.60 (₷ 130.89).

Kontoj de la broŝuroj en la sekvanta N°.

*Korektote* : Forgesiĝis inter la ricevitaj kotizoj la nomo de S-ro Grimm sur la Decembra bulteno; tamen la sumo estis ĝuste presita.

*Sekretario-kasisto : R. DESHAYS, Sens, Francujo*

*Jarkotizo kun la monata bulteno : 1 ₷ (Fr. 2.50)*

Presejo BALANDRA & ROYER. Chalon-s-Saône (Francujo)

291

BULTENO

DE

# Libera Penso

Internacia Societo Esperantista de Liberpensuloj

JARO 1909-1910 — No 7-8. Marto-Aprilo

# La Episkopo de Würzburg

## kaj la Liberpensuloj

La episkopo de Würzburg, D-ro von Schloer, deklaris militon al la liberpensuloj. En la lasta numero de l'Würzburga eparkia gazeto li direktas kontraŭ la moderna pagenismo jenajn parolojn : «En la unua tempo rimarkiĝas spirita movado, kiu, sub la nomo de Unuiĝo de Liberpensuloj, volas detrui la kredon al natura rivelado, mirakloj, anĝeloj, diablo, fantomoj, ĉarmoj, inferpunoj kaj ĉielĝuoj, prezenti ilin kiel imagbildojn de pasinta tempo kaj montris la homon ne kiel duoblan estajon kun korpo kaj animo, kreitajon de Dio sed kiel beston, kiu el besta deveno sin suprenlevis ĝis la stato de civilizita kulturestajo. Oni klopodas akiri al tiu sendia opinio la nuntempan kristanaron kaj precipe la junularon. Tio estas la malnova malamiko de l'kristanismo en iom nova vestajo. Pri la

urbo Würzburg ni decidas, ke en ĉiuj fastpredikoj de l'nuna fasttempo ĉe konvena okazo, same kiel en ĉiuj komunumaj kaj konventaj preĝejoj ĉe l'ordinara meso dimanĉon 13an nunan tiu movado estu citata, la popolo estu avertata kontraŭ ĉesto en tiaj kunestoj kaj admonata al fidela firmsintenado al la vera katolika kredo».

En tiuj linioj la oficiala katolika kristanismo de l'nuntempo plej klare montriĝas. Ne nur la kredo al persona Dio estas postulata, ankaŭ la kredo al mirakloj, anĝeloj, diabloj, fantomoj, ĉarmoj, inferpunoj kaj ĉielĝuoj, precize laŭ la postuloj de l'katehismo de l'jezuita patro Linden. La descendteorio (teorio de l'evoluado), kiun akceptas eĉ jezuito — Wasmann — estas kondamnata kiel herezo. Oni preskaŭ frapus sian kapon kaj demandus : Ĉu ni vere vivas en la 20a jarcento aŭ en la jarcento de Filipo IIa, kiam oni brulis ĉe vivanta korpo «in majorem gloriam dei ac virginis sanctae» ĉiun, kiu ni kredis al ĉiuj belaj aferoj kiel diablo kaj fantomoj? Ĉu la Reformacio utilis neniom tute neniom? Kiun signifon havas tiam scienco, se ĉiam ankoraŭ kredo estas predikata, kiu plej akre kontraŭiras la bazon de ĉiu scienco, la racion? kion diras la indiferentuloj, la nefervoruloj pri tiu episkopa dekreto, tiuj formintaj por si mem liberan religipionion? Ĉu ili ankoraŭ pensas, ke oni devas konservi al la «popolo» ĝian religion? Ĉu ili ne opinias ke devo de ĉiu veron amanta homo, estas kontraŭagi eklezian kredon, kiu havas nenion komunan kun la vera kristana religio kaj etiko, tiaj, kiajn Kristo ilin intruis? Kion diras la oficialaj riprezentantoj de l'bavaraj popollernejoj pri tiu episkopa sciigo? Oni kompreneble ne povos postuli, ke la ŝtato agu kontraŭ la episkopo. Tia agado kontraŭirus la kredliberecon. La episkopo povas tion kredi kaj instrui, kion ili konsideras bona. Aliflanke la ŝtato devus cedi al siaj instruistoj la rajton sammaniere tion kredi kaj instrui, kion ili konsideras vera. Oni imagu



al si, en kiun konscienekonflikton estas metata pripensema katolika instruisto, staranta sur la kampo de l'natursciencoj, kiu estas devigata enigi en siajn lernantojn la kredon al fantomoj, diablo kaj ĉarmoj.

La neceseco de regna, de l'eklezio tute sendependa religiinstruado povas esti montrata per nenio pli klare ol per la neordinara sciigo de l'episkopo de Würzburg, kiu rememorigas al ni jam de longe pasintan tempon.

Emil DOSENHAIMER.

Trad. de R. de Lad. el «Das Freie Wort» (Aprilo 1910).

## EN FRANCUJO

La 24an de Februaro la revoluciista ĵurnalisto Hervé kondamniĝis je 4 jaroj da malliberoco pro artikolo pri la morpolico. Multaj ĵurnalistoj el ĉiuj partioj, literaturistoj, ekonomiistoj la Ligo por la Rajtoj, de la Homo, k. t. p., indigne protestis kontraŭ malĝusta uzo de la jam malbenitaj leĝoj pri la anarkiistaj klopodoj.

Andrzej Niemajewski

# KATEĤISMO DE LIBERPENSULO

Tradukis Frank Sandecki

D. Kiu vi estas?
R. Homo.
D. Kia estas via plejunua devo?
R. Pensi per la propra cerbo kaj senti proprakore.
D. Kia estas via unua leĝo?
R. Paroli tion, kion mi pensas kaj sentas kaj ankaŭ laŭ tio agadi.
D. Al kiu tio estas bezona?
R. Al mi kaj al socio.

D. Kial al vi?
D. Ĉar mi volas ĉiam esti mema.
R. Kaj kial al socio?
R. Ĉar la socio volas koni veran vizaĝon de siaj membroj.
D. Por kiu celo la socio volas tion?
R. Por ke ĝi mem povu konstati tion, kio ĝi estas, kiaj bezonoj vekiĝas en ĝi, kiajn erarojn ĝi devas forĵeti el sia konstruo kaj kiajn bonaĵojn enkonduki.
D. Kia do estas la regula bazo de rilatoj inter unuo kaj socio kaj kontraŭe?
R. Sincera traktado de homaj aferoj.
D. Ĉu okazas alie?
R. Jes. La unuo mensogas al la socio kaj la socio mensogas al la unuo.
D. Kial ili tiel reciproke mensogas?
R. Pro malgrandanimeco kaj oportuno.
D. Kaj al kiaj rezultatoj kondukas tio?
R. La hipokriteco naskas ekspluaton kaj premon, malklarecon kaj mizeron kaj tiuj, trapasinte la limon, naskas la politikan aŭ socialan revolucion.
D. Kia estas la plejnemorala principo en tiaj rilatoj?
R. Ke la infanoj kaj nepoj suferas senkulpe pro la kulpoj de gepatroj kaj geavoj.
D. Kiamaniere kontraŭstari tion en estonteco?
R. Nur per la plena revolucio en sfero de pensoj kaj moralaj ideoj.
D. Kion vi komprenas en tiu esprimo?
R. Plenan revizion de ĉiuj niaj moralaj ideoj.
D. Kun kia signalo oni povas realigi tiun revizion de niaj ideoj?
R. Kun la signalo de jam suprecitita absolute sincera traktado de homaj aferoj.
D. Kiel estas nomata la homo, kiu anoncas tiun signalon?
R. Li estas nomata homo de libera penso.
D. Ĉu ekzistas la homoj de la penso dependanta?
R. Jes.
D. Kiuj ili estas?
R. Ili estas la homoj de diversaj religiaj konfesoj, sed ne akiritaj per esploro kaj pensado de opinioj.
D. Kiel vi nomus tiujn homojn?
R. La dogmuloj.
D. Kio estas la dogmo?
R. La dogmo estas la senkritika direktiga certigo, kies valoron mi ne volas pli profunde konsideri kaj mi eĉ malpermesas fari tion al aliaj.
D. Kiaj povas esti la dogmoj?
R. Religiaj, moralaj, socialaj kaj politikaj.
D. Ĉu ili estas egale malutilaj?
R. Jes, senkondiĉe.
D. Kial?
R. Ĉar ekzistas la interdependeco de aperaĵoj. La religio influas sur la moralecon, kreas ian socian atmosferon kaj laŭ ĉi-tio formiĝas poste la politiko de socio.
D. Kaj kie estas la regiono, kiu ne havus siajn dogmojn?
R. Mi konas ĝin. Ĝi estas la scienco.
D. Ĉu la scienco efektive posedas neniajn dogmojn?
R. Ne, Ĉia, eĉ plej disvatigita scienca konvinko povas esti ĉiumomente renversata kaj ŝanĝata per alia pli perfekta, anoncita kaj



ĝusta argumentita per iu ajn esploristo, kaj tuj ĉiuj aliaj sciencistoj korektas laŭ lia esploro siajn sciojn.
D. Kion vi rimarkas en tiu eksterordinara apero?
R. Ke sciencistoj laboras sub la kontrolo de la tuta mondo kaj ke devigas komune la principo de kontrolebleco.
D. Kian principon vi rimarkas en tiel komprenata laboro?
R. Mi rimarkas la principon de alta moraleco.
D. Kia estas en tiu okazo ĝia esenco?
R. La metodo aŭ la maniero de agado, kiu apogas sin sur la citita absolute sincera traktado de homaj aferoj.
D. Ĉu la sincera homo ne povas erari?
R. Li povas erari kaj tial la plua eco de tiu metodo estas ankaŭ la dirita jam kontrolebleco.
D. Kial oni devas kompreni tiun kontroleblecon?
R. Tre vaste. Ĉiu demando estas pridiskutata ne nur de vivantaj generacioj, sed ankaŭ de la estontaj. La sciencisto scias, ke veroj kiujn li hodiaŭ konstatas, povos esti malaprobitaj — kiel eraroj — de estontuloj.
D. Ĉu tiu vidpunkto ne kondukas min al pesimismo aŭ al dubo pri la realigebleco de niaj pensoj?
R. Kontraŭe. Tio kondukas nur al optimismo, aŭ al la fido en ilian sukceson, ĉar la sciencisto scias, ke se li eĉ farus eraron, liaj sekvontuloj sendube korektos tiun eraron.
D. Kio subtenas lin en tiu kredo?
R. Certe tiu metodo de sincera traktado de homaj aferoj kaj la principo de kontrolebleco. Kvankam do la sciencisto transdonis al sekvontoj ian teorion eraran, aŭ ian eraran observadon tamen li transdonis al ili ankaŭ la devon kontroli la teorion kaj konstantan perfektigon de observadoj, ĉar la scienco ne ekzistas por la defendo de iaj veroj, sed por la serĉado de vero ĝenerale.
D. Kian la homo nomas la vero?
R. La ekkonon de esenca stato.
D. La religio ja ankaŭ havas nur la veron kiel sian celon?
R. Tio nome estas ĝia iluzio.
D. Kial?
R. Ĝi ne celas al vero, nur ĝi elfluas el iaj veroj.
D. Kion nekonvenan vi rimarkas en tiu agado?
R. Plene la falsan metodon.
D. El kio eliras la falso de tiu-ĉi metodo?
R. La religio unue anoncas iajn principojn kaj poste nur ĝi trovas, por ilin subteni, argumentojn, ĉu en la ekstera mondo, ĉu ankaŭ en la sento nekontrolata per prudento. Kaj se unu kun alia ne povas konsenti, pli volonte opinias, ke la argumentoj estis malbone almetitaj, aŭ ke la homa sento estis malbonigita ol ke *à priori* akceptitaj principoj estis eraraj.
D. Kiamaniere agas la scienco?
R. Tute kontraŭe. Ĝi esploras la aperojn, elkondukas el ili la konkludojn, el konkludoj konstruas la teoriojn kaj iafoje starigas la hipotezojn, aŭ supozojn. Neniam ĝi oferos la aperojn al principo kaj pli volonte forĵetas la principon, ol malŝatus la aperojn.
D. Kia do estas la principa diferenco inter la metodoj religia kaj scienca?
R. La religio okupas sin pri la adoro de principoj kaj la scienco okupas sin pri la kritiko de principoj.
D. Kio do interesas la religion?
R. La konfeso.

D. Kaj kio interesas la lernadon?
R. La scienco.
D. Sed el tio, kion oni diris, sekvus ke la metodo de religio estas ne morala?
R. Jes, senkondiĉe, en la hodiaŭa kompreno de aferoj. Se iu ne povas kredi en iun ajn dogmon sur la bazo de atingitaj esploroj, la religio nomas lin homo ne religia, aŭ malbona, kaj forpuŝas lin el sia sino kaj al aliaj ĝi malpermesas kuniĝi kun li. Tute kontraŭe agas la scienco. Se iu ne povas kompreni ian opinion, la scienco nomas lin homo malmulte kapabla kaj konsilas diligente zorgi, por ke li isvolvu siajn kapablecojn kaj alvenu al pli bona konscio. La religio ankaŭ postulas de nekredanto la humilecon, kaj la scienco, ne povante iun konvinki, mem sentas sin humiligita, ĉar videble la metodoj de ĝia instruado ne estis perfektaj kaj ili devas esti subigitaj al ia plibonigo.
D. Kian do tipon de homo edukas la scienco?
R. La tipon de homo modesta kaj sendependa.
D. Kaj la religio?
R. La tipon de fierulo kaj de sklavo.
D. Al mi tamen ŝajnis, ke la religio instruas pri la humileco?
R. Tio ne estas la humileco sincera.
D. Kaj ĉu la scienco ne rekomendas la humilecon?
R. Tute ne. Ĉar ĝi estas sklava sento.
D. Kial do la religio disvastigas la sklavajn sentojn?
R. Por ke ĝi regu la animojn de homoj kaj per ili la terajn bonojn, kiujn tiuj animoj produktas.
D. La religio estas tamen ideo abstrakta kaj la ideoj abstraktaj havas nek stomakojn nek poŝojn?
R. Tamen ilin havas tiuj, kiuj la religion komprenas kiel sian havajon, alportantan enspezojn.
D. Kiuj estas tiuj homoj?
R. La pastroj.
D. Ĉu ili efektive reprezentas tiun potencon?
R. La plejgrandan kaj la plejmalamikan, ĉar ili metas la katenojn ne sur la manojn kaj piedojn, sed sur la pensojn kaj sentojn.
D. Kiamaniere ili faras tion?
R. Ili malpermesas al homoj pensadi per propra cerbo kaj senti per propra koro. La pastroj permesas pensi nur per ilia pastra koro. Tial tutaj socioj fariĝas malprogresemaj, malantaŭemaj, malbonaj kaj ne produktodonaj. Tio kaŭzas de tempo al tempo la eksplodojn de malkontentecoj, ribelojn, sangajn revoluciojn kaj poste la reakciojn. Homo katenigita de ili je la prudenteco kaj sento ĵetas sin kiel besto en kaptokaĝon kaj neniel li povas ekrigardi la kaŭzon de siaj malfeliĉajoj. Tiel la pastroj kun sia religio fariĝas ĉefa baro de ĉiu progreso kaj tio daŭros tiel longe ĝis la homoj liberigos sin tute el ilia influo.
D. Kiu prenis sur sin tiun liberigantan penon?
R. La homo de la libera sendependa penso.
D. Kion faras la eklezio kun tiuj homoj?
R. Ĝi anatemigas ilin.
D. Kaj kion faras la scienco?
R. Ĝi armas ilin al la pensa batalado.
D. Kio do estas la scienco por la homoj de libera penso?
R. Ĝi estas por ili la vera Providenco.
D. Kaj kion la homoj ŝuldas al la scienco reciproke?
R. Zorgi pri tio, ke ĝi estu ĉiam sendependa.



D. Ĉu la scienco povas esti dependanta?
R. Jes. La eklezio iam tenis la sciencon en siaj manoj, kaj la filozofion nomis eĉ «servistino de teologio» (ancilla theologiae). Ĝi bruligis sur la lignaro la saĝulojn kaj iliajn verkojn. En sekvo de tio la scienco per multaj jarcentoj ne povis ĝuste disvolviĝi. Per tio suferis tuta homaro, dronante en senscieco kaj mizeron.
D. Ĉu tiamaniere agis nur la katolika eklezio?
R. Ne. Tute same agis la protestantoj kaj rabenoj. La diferencoj en la grandeco de premado dependis nur de ordona potenco de ĉiu religio.
D. Sed hodiaŭ eble la pastroj, pastoroj kaj rabenoj persekutas jam neniun?
R. Hodiaŭ ilia potenco estas multe plimalgrandigita.

(*Daŭrigota*)

## LA SOCIETO

Ni sendigis de la INTERNACIA FEDERACIO de L. P. 125 membromarkojn : ni sendos ilin al tiuj el niaj societanoj, kiuj petos, nepre al la partoprenontoj en la Brusela Kongreso. Nin avertu tiuj, kiuj intencas ĉeesti kaj akceptus esti delegitoj de nia societo.

Ĉe la Amerika Kongreso, niajn aferojn zorgos S-ro Schubert, oficiale komisiita por kongresaj aranĝoj, kaj certe helpos eminenta tiea liberpensulo, nia nova kunsocietano J. Morton. Sed Amerikon aŭ Belgujon multaj veturu ni!

## NOVAJ ALIĜOJ

S-ro D-ro A. STROMBOLI, via Assarrotti 54/5, Genova, Italujo.
S-ro J.-M. KERR, Denver, Colo, Usono.
S-ro H. HERMANT, Zwartboysstadt, via Pretoria, Transvaal.
S-ro PERCEVAL, Beaune, Francujo.
S-ro P. SCHREYER, 3 Komp. Inf. Reg. N. 148, Bromberg, Germanujo.
S-ro James F. MORTON, Jr. 309 Broadway' New York. Usono.
*Eksiĝis* : Cayeux, Dugourd, Jenser, Maillard, Reiss, Terras, Saquet, Sassolat.
Entute : 145 membroj.

## *KASO. — Marto-Aprilo 1910*

| | | |
|---|---|---|
| *Enspezoj* : | Reportite | Fr. 101.45 |
| | 2 abonoj de Ilarejo esp. Helsinki, Finn | 3.90 |
| | Abono de Svisa Biblioteko | 2.50 |
| | — Le Soudier, per Warnier | 2.25 |
| | — Markov, per Stettler | 1.90 |

BULTENO

DE

# Libera Penso

Internacia Societo Esperantista de Liberpensuloj

JARO 1909-1910 — N° 9. Majo

# BJÖRNSTJERNE BJÖRNSON

Mardon, la 26an de aprilo pasinta mortis Bjœrnstjerne Bjœrnson en sia 78a jaro. Li estis unu el la plej grandaj antaŭpuŝantoj de libera penso, kaj lia agado, liaj verkoj kondukis milojn da homoj for el la marĉo de la malsincera, ekstera religio, de la sociaj mensogoj, de la duobla seksa moralo kaj de la indiferenta tradiciemo. Ĉiuj liaj verkoj montras tion, kaj plue tiu senlaca entuziasmo pri la grandaj reformoj de l'publika kaj de l'privata vivo vidiĝas el la sennombraj liaj publikaj paroladoj kaj gazetartikoloj en Norvegujo kaj Danujo. Liaj dramoj estis karakterizaj pri liaj celadoj : la veremo kaj la sinceremo mem estas la plej fundamenta bazo de ili. Kaj se ni, liberpensuloj, eĉ trovas en liaj ideoj ĉiam iun metafizikan diideon, simile kiel ĉe nia ano Tolstoj, kaj certan tro optimisman iluzion pri la solviĝo de l'sociala demando, ni ĝojas, vidi sur ĉiu linio de liaj verkoj la liberemon, la veremon kaj la komprenemon pri ĉio homa. La tri dramoj « La reĝo » (Kongen), « Super kapablo » (Over aevne) kaj « La ganto » (En hanske) estas tipaj kaj donas al la leganto ideon pri la entuziasmema homo, kiu ilin skribis. « La reĝo » priskribas la mizeran situacion, en kiu troviĝas monarĥo, kiu interne volas esti sincera kaj ne havas la superhoman forton, kiun li bezonus, por liberiĝi el tiuj sennombraj mensogoj, al kiu lin ligas la institucio, kies nur proŝajna riprezentanto li estas

Vidiĝas la interligo inter monarĥismo, kapitalismo, milita-
rismo kaj religio (eklezio). Samtempe Bjœrnson pentras ĉi
tie homajn karakterojn, idealon de edzeco, kiuj edifas ĉiun
ajn . La dramo « Super kapablo » pentras en sia dua parto
la socialan batalon. « La nova tempo, la nova stato, kiu
venos, » — li diras — « estos precize, ke ekzistos nek
granda riĉeco nek granda malriĉeco. . . . Laŭ mia opinio la
teruraj militŝarĝoj, la vastegaj ŝtatbudĝetoj, la malŝpara
privata vivo estas seriozaj atestantoj pri tio. Ni vivas
super kapablo. Sen tio la anarkiismo estus tute neebla.
La manko de ĉiu konscio pri respondeco, de ĉiuj homaj
konsideroj, kun kiu riĉuloj formalŝparas milionojn, kva-
zaŭ ekzistus neniu alia ol ili mem kaj tiuj, kiuj helpas
al ilia amuziĝado, jen estas precize la kruda anarkiismo,
la revolucio kontraŭ la diaj kaj homaj leĝoj ! ». La dramo
« La ganto » batalas kontraŭ la duobla seksa moralo kaj
ĉiuj familiaj kaj publikaj mensogoj, kiuj estas ligitaj al
tiu ĉi. Precize tiu ĉi dramo kaj la « Reĝo » pentras
al ni idealajn virinajn tipojn kaj ankaŭ tipojn de idealaj
viroj. Ankaŭ ĝenerale Bjœrnson scias montri al ni la
veron en ĝia tuta beleco kaj la mensogon en ĝia kruda
malbeleco. Ni jam ne dubu, ke la Bjœrnson'aj verkoj vivos
longe, kaj ni esperu, ke ĉiu leganto de ili lasu sur sin
influi la belajn tendencojn de ilia aŭtoro.

O. B.

---

**Andrzej Niemojewski**

# KATEĤISMO DE LIBERPENSULO

**Tradukis Frank Sandecki**

*(Daŭrigo)*

*Andrzej Niemojewki, la fama pola liberpensulo kies verkon ni pu-
blikigas, senĉese suferas konfiskojn kaj procesojn pro episko-
paj denuncoj. Lian lastan verkon « Dio Jezuo », konfiskitan de
la rusa cenzuro, germane eldonos la librejo Huber Frères en
Winterthur (Svisujo)).*

D. Kiu limigis ilian potencon?
R. La civilizacio laŭ sia disvolvo.
D. Kie tamen estas ilia ĉefa fortikeco?
R. En la homa malsaĝeco.

BULTENO
DE
**Libera Penso**

**Internacia Societo Esperantista de Liberpensuloj**

**JARO 1909-1910 — Nº 9. Majo**

# BJÖRNSTJERNE BJÖRNSON

Mardon, la 26an de aprilo pasinta mortis Bjœrnstjerne Bjœrnson en sia 78a jaro. Li estis unu el la plej grandaj antaŭpuŝantoj de libera penso, kaj lia agado, liaj verkoj kondukis milojn da homoj for el la marĉo de la malsincera, ekstera religio, de la sociaj mensogoj, de la duobla seksa moralo kaj de la indiferenta tradiciemo. Ĉiuj liaj verkoj montras tion, kaj plue tiu senlaca entuziasmo pri la grandaj reformoj de l'publika kaj de l'privata vivo vidiĝas el la sennombraj liaj publikaj paroladoj kaj gazetartikoloj en Norvegujo kaj Danujo. Liaj dramoj estis karakterizaj pri liaj celadoj : la veremo kaj la sinceremo mem estas la plej fundamenta bazo de ili. Kaj se ni, liberpensuloj, eĉ trovas en liaj ideoj ĉiam iun metafizikan diideon, ŝimile kiel ĉe nia ano Tolstoj, kaj certan tro optimisman iluzion pri la solviĝo de l'sociala demando, ni ĝojas, vidi sur ĉiu linio de liaj verkoj la liberemon, la veremon kaj la komprenemon pri ĉio homa. La tri dramoj « La reĝo » (Kongen), « Super kapablo » (Over aevne) kaj « La ganto » (En hanske) estas tipaj kaj donas al la leganto ideon pri la entuziasmema homo, kiu ilin skribis. « La reĝo » priskribas la mizeran situacion, en kiu troviĝas monarĥio, kiu interne volas esti sincera kaj ne havas la superhoman forton, kiun li bezonus, por liberiĝi el tiuj sennombraj mensogoj, al kiu lin ligas la institucio, kies nur proŝajna riprezentanto li estas

Vidiĝas la interligo inter monarĥismo, kapitalismo, militarismo kaj religio (eklezio). Samtempe Bjœrnson pentras ĉi tie homajn karakterojn, idealon de edzeco, kiuj edifas ĉiun ajn . La dramo « Super kapablo » pentras en sia dua parto la socialan batalon. « La nova tempo, la nova stato, kiu venos, » — li diras — « estos precize, ke ekzistos nek granda riĉeco nek granda malriĉeco. . . . Laŭ mia opinio la teruraj militŝarĝoj, la vastegaj ŝtatbudĝetoj, la malŝpara privata vivo estas seriozaj atestantoj pri tio. Ni vivas super kapablo. Sen tio la anarkiismo estus tute neebla. La manko de ĉiu konscio pri respondeco, de ĉiuj homaj konsideroj, kun kiu riĉuloj formalŝparas milionojn, kvazaŭ ekzistus neniu alia ol ili mem kaj tiuj, kiuj helpas al ilia amuziĝado, jen estas precize la kruda anarkiismo, la revolucio kontraŭ la diaj kaj homaj leĝoj ! ». La dramo « La ganto » batalas kontraŭ la duobla seksa moralo kaj ĉiuj familiaj kaj publikaj mensogoj, kiuj estas ligitaj al tiu ĉi. Precize tiu ĉi dramo kaj la « Reĝo » pentras al ni idealajn virinajn tipojn kaj ankaŭ tipojn de idealaj viroj. Ankaŭ ĝenerale Bjœrnson scias montri al ni la veron en ĝia tuta beleco kaj la mensogon en ĝia kruda malbeleco. Ni jam ne dubu, ke la Bjœrnson'aj verkoj vivos longe, kaj ni esperu, ke ĉiu leganto de ili lasu sur sin influi la belajn tendencojn de ilia aŭtoro.

O. B.

---

**Andrzej Niemojewski**

# KATEĤISMO DE LIBERPENSULO

**Tradukis Frank Sandecki**

*(Daŭrigo)*

*Andrzej Niemojewki, la fama pola liberpensulo kies verkon ni publikigas, senĉese suferas konfiskojn kaj procesojn pro episkopaj denuncoj. Lian lastan verkon « Dio Jezuo », konfiskitan de la rusa cenzuro, germane eldonos la librejo Huber Frères en Winterthur (Svisujo)).*

D. Kiu limigis ilian potencon?
R. La civilizacio laŭ sia disvolvo.
D. Kie tamen estas ilia ĉefa fortikeco?
R. En la homa malsaĝeco.



D. Kiamaniere ili regas homan malklerecon?
R. Ili inspiras al homoj artikolojn de siaj kredoj kaj malpermesas legi kritikajn verkojn.
D. Kion vi rimarkas en tia sistemo ?
R. Malgrandanimecon kaj timon de vero.
D. Ĉu vi ne trograndigas?
R. Ne. Ĉar estas ankoraŭ pli malbone. Mi preterlasas la protestantojn, kiuj ĉe ni prezentas efektive tipon de homoj pli progresemaj. Sed rabenoj, ekzemple per la melamedoj (infaninstruistoj de Talmudo) en ĥederoj (lernejoj) inokulas al malfeliĉaj judaj infanetoj Talmudon dividantan la homojn en estaĵojn purajn kaj malpurajn, opiniantan ĉiun ne-hebreon malpurulo (zaw). Kaj la katolika eklezio staras kiel absoluta institucio kontraŭ miaj fundamentaj bezonoj.
D. Kiaj ili estas?
R. La libereco de penso, parolo, konscienco, religio kaj preso. Papo Pio X nomis tiujn-ĉi liberecojn la baza eraro de niaj tempoj. Sekvante tiun-ĉi voĉon mi estus malamiko de mi mem kaj de mia propra socio.
D. Kiel estas nomata via socio?
R. Regno Pola.

---

D. Ĉu Pollando havis homajn de libera penso?
R. Ĝi havis ilin ĉiam. Ili estas la plej gloraj personoj en la historio de nia patrujo.
D. Nomu la plej gravajn?
R. Fronte staras Mikolaj Kopernik (1473-1543) kreinto de nova astronomio, kies verko altiris anatemon de la eklezio. Poste mi vidas Mikolaj Rej (1505-1568) literaturan patron de pola verkado, kiu deturnis sin de la katolika eklezio kaj aligis sin al la Kalvina eklezio. Poste mi rimarkas maljunulinon Katarzyna el gepatroj Zalassowski Melchiorowa Weigel, kiun Krakova episkopo Gamrat ordonis bruligi en la jaro 1539 por ŝiaj liberpensaj opinioj; ŝi forĵetis la diecon de Jezuo Kristo, certigante, ke Dio, kiel estaĵo eterna ne bezonas havi infanojn, kaj ke nur la homoj, kiuj mortas, devas havi posteulojn, kaj ni ĉiuj estas infanoj de Dio. Lukasz Gornicki glora pola verkisto-historiisto, kiu per la propaj okuloj vidis ŝian morton skribas : kun ne plimalgranda karaktero ŝi iris sur la lignaron ol kun kia ŝi disvolvadis siajn ideojn al kanonikoj (pastroj). Liberpensulo estis la unua granda pola poeto Jan Kochanowski (1530-1580) kiu, kiam mortis lia plej amita filineto Urŝuljo, skribis : « Kie ajn ci estas, se ci estas..... kompatu al mia ĉagreno ! » Li batadis ankaŭ la papon, skribante : « Mi ne povas nomi cin sankta, mi ne hontas nomi cin patro. ĉar sankta pastro, mi vidas ciajn filojn»..... Liberpensulo estis episkopo Ignacy Krasicki (XVIII centjaro) kiu en la vera lumo montris ebrian monaĥejan pastraron. Nacia reformisto konsente de Libera Penso estis granda reformatoro de lernejoj Kollontaj (1750-1812) doktoro de teologio de Roma akademio, rektoro de krakova akademio, kiu kune kun framasonoj Stanislass Potocki kaj suprecitita kanoniko Jezierski plejmulte meritis ĉe la enkonduko de nia konstitucio de 3 Majo 1791. Sama Potocki estis ĉe ni 10 jarojn ministro de popola instruado kaj prezentis grandajn meritojn ĉe la levo de pola pensado. Homoj de la sendependa penso estis : Henryk Dombrowski, pola generalo, kreinto de militaj polaj legionoj en Francujo (nask. 1755, mortis 1813 en Parizo) Karol Kniaziewicz

# NOVAJ ALIĜOJ

### Germanujo

S-ino Elisabeth Hüffmeier, Osterstr. 169, Hamburg.
S-ro Henry Meyer, Billwarder Steindamm 98, 1, Hamburg.
S-ro J. Neumann, Albertstr. 16, 3, Hamburg.

Eksiĝis : S-ro J. Keller.

Entute : 116 membroj.

# KASO

| | | |
|---|---|---|
| *Enspezoj* : | Kotizo de Roux.......... sm | 0.79 |
| — | F-ino Hüffmeier... | 0.94 |
| — | Neumann......... | 0.94 |
| — | Meyer............. | 0.94 |
| — | O. Bünemann por estonta ano..... | 0.94 |
| — | Ge-roj Wolf....... | 1.98 |
| — | kaj donaco de Davidov.......... | 3.96 |
| | *Transportite*.................. | 28.68 |
| | Sumo..... | 39.17 |
| *Elspezoj* : | Sendo de Jan. bultenoj......... | 1.72 |
| | Pago al la presisto (parto del konto Evstifeieff)........... | 23.76 |
| | Sumo..... | 25.48 |

Restas en kaso : 13.69.

## *Ne plu prokrastu la pagon de la malfruaj Kotizoj*

Laborista Presejo Esperantista
52, rue Thénard, Sens (Francujo)